

ESPERANTO

Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

[illegible]

Enhavo

- 141 81-a Universala Kongreso, Prago, 20-27 julio 1996:
En Prago ni ne estis nur inter ni
- 142 Solena Inaŭguro: En eminente kultura etoso; Mesaĝoj de Boutros Boutros-Ghali, Federico Mayor, Václav Havel, Miloslav kardinalo Vlk kaj Louis C. Zaleski-Zamenhof
- 144 Kongresa Komunikado 1 de la 82-a Universala Kongreso, Adelajdo
Komitato: Jam pli ol 100 asocioj en la monda organizo (Osmo Buller)
- 145 Kongresa Rezolucio: Al nova monda lingva ordo
- 146 Manifesto de Prago
- 147 Nitobe-Simpozio: "Cinikeco pri Esperanto estis parto de nia edukado" (intervjuo kun Robert Phillipson); "Pri la temo regas nescio" (intervjuo kun Allan Wynne Jones)
- 148 Kongresa Temo: Mensa furaĝo (István Ertl)
Tago de la Paco: Ĉu planti pacarbon sufiĉas? (Ulrich Becker)
- 149 Intervjuo kun Reinhard Selten: "Post jardekoj ne multo ŝanĝiĝis"
- 150 Lingvopolitiko: Unua lingvopolitika seminario (Detlev Blanke);
Kulturo ekskluzive nia (Giuseppe Valente)
- 151 Akademio de Esperanto / Faka agado: Akademio sen slipetoj
(Josef Šemer, Amri Wandel); Sprone al faka agado (Amri Wandel)
- 152 Arta programo: De Silfer al Zamenhof (Péter András Rados); Bonordaj
stilprofiloj (Stefan MacGill); Arton respektu (Saša Sirovec); Ni vidis
reĝinon (Gerrit Berveling); Magia rido (Joel Brozovsky); Ravo kaj rido
(Edmund Grimley Evans); Bela aŭskulto, ĝua kompreno (Nicolino Rossi)
- 154 Solena Fermo: Meze de granda familio
- 155 Laste aperis
- 156 Kongresa kroniko; Rond-okule kaj radar-orele (Sylvain Lelarge)
- 159 Instruado: Sub la signo de Mazi kaj memlernado;
Impona infankongreseto (Ian Fantom); Fondaĵo Carson elĉerpota
(Jean E. Smythe); Anoncetoj
- 160 Str-angulo: Alta akvo en la Centra Oficejo

Vi trovos

kiel riĉa estis la programo de la 81-a UK en Prago: kongresa mozaiko sur 20 paĝoj ankoraŭ ne elĉerpas ĉiujn ĝiajn aspektojn, kaj al kelkaj ni revenos en oktobro.

Manifesto, rezolucio, salutoj de eminentuloj: formalaj, oficialaj tekstoj okupas iom pli da spaco ol kutime. Ili meritis zorgan legadon, aparte la Manifesto de Prago (p. 146), kiu envortigas la sencon de la esperantistaj strebadoj. Vidu ĉu ĝi kongruas kun via koncepto pri la temo — se jes, la Manifesto staras malfermita ankaŭ por via subskribo kaj atendas vian diskonigan helpon.

Ni aparte ĝojas ke en la jaro kiam centjariĝas la Esperanta teatro, ni povas enpresii eĉ kvin recenzojn pri aktoraj plenumoj dum la UK (p. 152-53). Sed simptomas ke nur unu el la kvin prezentitoj inspiriĝis de originale Esperantaj verkoj.

La Praga UK estis kongreso de kulturo, kaj ne nur pro la elektita temo (p. 150). Tion pravas eĉ "Laste aperis": per preskaŭ du paĝoj (p. 155-56) kun 45 titoloj ankoraŭ ne ĉiuj novaĵoj estas enlistigitaj.

Kovrilo: Foto de Miroslav Krob sur fono de subskriboj por la Manifesto de Prago. *Aliaj fotoj:* Kongresa fotoservo.

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktotino: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 61; US\$ 35; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p. 1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p. 175. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +31-10-436-1044.

Telefaksa: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎ +82-53-950-5425 [of], +82-53-765-0880 [h]; ☎ +82-53-950-6247 [of], +82-53-765-0881 [h]; ☐ keast@soback.kornet.nm.kr.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-6-39-72-61-98; ☎ +39-6-39-72-61-69; ☐ mc8750@molink.it.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎ +31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ☎ +31-50-3613763 [of]; ☐ a.f.de.geus@td.azg.nl.

Estrarano (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎ +1-613-565-9282; ☎ +1-613-565-9279; ☐ mfettes@magi.com.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio; informado): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎ +370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ☎ +370-7-228616 [of].

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎ +972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ☎ +972-2-658-4437 [of]; ☐ amri@vms.huji.ac.il.

En Prago ni ne estis nur inter ni



La dumkongresa Nitobe-Simpozio altabligis lingvofakulojn kaj politikistojn. De maldekstre sidas: Yvo Peeters (Internacia Akademio pri Lingva Juro), Hans Erasmus (Laborgrupo pri la Lingvo-Problemo en EU), John Wells, Olivier Dupuis (Transnacia Radikala Partio) kaj Allan Wynne Jones (Eŭropa Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj).

Neniu urbo kiu iam invitis Universalan Kongreson devis atendi por dua fojo tiel longe kiel la ĉeĥa metropolo: Prago denove gastigis UK-on, la 81-an, post la forpaso de precize 75 jaroj. Estas dubinde ĉu iu ajn el la nunaj 2972 aliĝintoj el 66 landoj ankoraŭ povas atesti pri la samurba 13-a mondkongreso en 1921. Pasis bedaŭrinde tri kvaronoj de jarcento, la longo de homvivo, sen okazo de mondskala elmontriĝo por la floranta movado ĉeĥa kaj ĉeĥoslovaka, ĉiam inter la plej fortaj de la mondo.

Pragaj kongresoj estas do maloftaj, sed historie gravaj: same kiel la movadaj analoj konservas la memoron de la 13-a UK en 1921, la unua amase vizitata post mondmilito, tiel ili registros ankaŭ la UK-on de 1996 — almenaŭ pro du kialoj.

La unua kialo ne estas sen rilato al la jaro 1921. Tiam al Prago venis delegitoj de Ligo de Nacioj, de Internacia Laboroficejo kaj de Ruĝa Kruco. La unua el ili, d-ro Inazô Nitobe, vicsekretario ĝenerala de la Ligo, verkis tre favoran raporton pri la funkciado de Esperanto, el kio sekvis ties pritrakto ĝis hodiaŭ plej altnivela ĉe internacia forumo. Por ke Esperanto denove spertu tian konsideradon en mondo kiu daŭre bezonas lingvan demokration, UEA organizis en 1996 la Nitobe-Simpozion, aranĝon por ne-esperantistaj fakuloj, kiuj diskutis, en la spirito de la japana diplomato, pri “Lingvo por internaciaj paco kaj demokratio”.

Ĉi-jare, do, la UK aperis kiel partopreninda evento sur la agendoj de kelkaj lingvistoj kaj politikistoj, kiuj foriris kun bonaj impresoj pri la realo de Esperanto, kaj kun memoro pri fruktodonaj lingvopolitikaj diskutoj. Restas la deman-

do ĉu la simpozio povos iĝi tradicio kiu konektos niajn Universalajn Kongresojn en la internacian cirkviton de lingvosciencaj eventoj. Se ni volas influi la publikan pensadon pri lingvaj demandoj, ne sufiĉas sterile prediki al la pensantoj, sed necesas inviti ilin al senchava dialogo.

Alia konkreta indiko ke nia tro ofte enfermiĝema komunumo volas elmontri siajn valorojn, estas la Manifesto de Prago. Ĉi tiu dokumento klopodas resumi ideojn kiuj de longe cirkulas kaj hejmas en esperantistaj medioj; fakte, ĝia noveco konsistas nur en tio ke ĝi unuafoje koherigas pens-erojn kiujn, apartajn, multaj esperantistoj konscias kaj konsentas. Ĉu la Manifesto vere alparolos la eksteran mondon, tio dependos de la efikeco de ĝia utiligo. Sed almenaŭ, ekde nun, kiam ĵurnalistoj demandas: “sed kion volas la esperantistoj?”, oni ĉiam povos enmanigi al li folion kun la teksto de la Manifesto, kiu portas aprobsignon de ĉ. 700 kongresanoj kaj restas malfermita al pluaj subskriboj.

Dum la kongresa semajno la publika intereso en Ĉeĥio direktiĝis al formado de nova registaro, kaj la mondo absorbiĝis en la Olimpiaj Ludoj, kiujn perturbis atenco ĝuste en la lasta tago de nia kongreso. Ne restis do multa atento al la UK — kvankam ni ankoraŭ ne povas mezuri ĉiujn postajn eĥojn ĉe la amaskomunikiloj.

Por ni kiuj mem spertis ĝin, la kongreso estis bonega. La praganoj sekvis la “finnan vojon”, apenaŭ postrestante la organizan perfektecon spertitan pasintjare en Tampere. Se foje, pro entuziasmo mem, okazis misetoj kaj malglatiĝoj, la helpemo kaj afablo de la organizantoj pli ol kompensis ilin. ★

Mesaĝo de Boutros Boutros-Ghali, Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj

Mi ĝojas saluti la partoprenantojn de la 81-a Universala Kongreso de Esperanto. Venante el tiom da diversaj landoj, vi faras apartan impreson ĉe ni en Unuiĝintaj Nacioj per via kapablo kunveni kaj debati sen interpretistoj.

Dum Unuiĝintaj Nacioj eniras sian duan jarkvindekon, la neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun UN, kiel Universala Esperanto-Asocio, fariĝas ĉiam pli gravaj por la laboro de la Organizaĵo. La lerto, sperto kaj sindediĉo de la multaj NRO-aktivuloj donas esencan kontribuon en vasta aro da kampoj. Via Asocio jam elmontris sian volon plivastigi la senperan kaj egalecan partoprenon de civitanoj en la laboro de Unuiĝintaj Nacioj kaj plibonigi la komunikadon kaj interkompreniĝon inter la nacioj. Tiujn celojn mi tutkore subtenas.

Mi sendas miajn bondezirojn por stimula kaj frukto-dona kongreso.

Mesaĝo de Federico Mayor, Ĝenerala Direktoro de Unesko

Estas por mi granda plezuro etendi korajn salutojn al la partoprenantoj de la 81-a Universala Kongreso de Esperanto, okazanta en la historia urbo Prago. Kiel vi scias, Unesko donas apartan gravecon al sia kunlaboro kun internaciaj kaj naciaj neregistaraj organizaĵoj, konsekvence kun sia strebado al la celoj de internaciaj solidareco kaj interkompreno. Konsidere al tio, ni taksas valoron nian longdaŭran rilaton kun Universala Esperanto-Asocio, kiu kuraĝigas dialogon inter la popoloj de la mondo per la antaŭenigo de universala lingvo.

Unesko, kiu havas la statutan taskon helpi subteni la “fruktodonan diversecon” de la kulturoj de la mondo, kredas ke universaleco devas enteni plurecon. Lingvo estas, kompreneble, la vivanta koro de ĉiu kulturo, kaj tial lingvoj devas esti konservataj en la varieco de siaj formoj. Multaj el la 4000 ĝis 5000 lingvoj de la mondo — ĉiu reprezentanta unikan manieron koncepti la realon — povus malaperi tra la venonta jarcento, krom se oni konscie penas protekti ilin. Per sia *Linguapax*-projekto, Unesko estas aktive engaĝita ĉe la protekto de la lingva heredaĵo de minoritataj kulturoj, ne laste per la antaŭenigado de denasklingva instruado. La lingvoj de la mondo konsistigas universalan heredaĵon kaj devas esti konservataj — kaj por si kaj por ni.

La lingva diverseco, tamen, devas neniam servi kiel preteksto por eksterlaso kaj antaŭjuĝo. Per la antaŭenigo de komuna formo de komunikado, Universala Esperanto-Asocio helpas konstrui pontojn de interkompreno inter la popoloj kaj kulturoj de la mondo, por montri ke unueco en diverseco eblas — kaj necesas — en nia pli kaj pli interdependa mondo. Mi deziras al la Kongreso de via Asocio ĉian sukceson en ĝia laboro.

En eminente



Malgraŭ kvaronhora malfruo komence de la Solena Inaŭguro, la 81-a Universala Kongreso daŭris, oficiale, preskaŭ du horojn pli ol kutime.

Spite al tradicio, UEA-prezidanto LEE Chong-Yeong ne atendis la finon de la inaŭguro por solene malfermi la kongreson, sed deklaris ĝin malfermita jam en sia komenca parolado. Komparante la partoprenantaron en la Pragaj UK-oj antaŭ 75 jaroj kaj nun, li konstatis ke la movado daŭras, kreskas kaj disvolviĝas — sub la sama devizo, “unueco en diverseco”, kiu animas la agadon de Unuiĝintaj Nacioj. Tamen, eĉ post 75 jaroj la ekstera mondo ankoraŭ malmulton scias pri Esperanto.

Vlastimil Kočvara, LKK-prezidanto, esprimis sian fidon ke pli granda kvanto kaj pli alta kvalito ol en 1921 helpos montri al la ekstera publiko, ofte misinformita, kio efektive estas Esperanto. Vicurbestro Vladimír Drábek esperis ke la etoso de Prago, urbo eminente kultura, kontribuos al la sukceso de la UK.

Mark Fettes prezentis la ĉeestantajn diplomatojn: ambasadorojn de Litovio, Slovenio, Ukrainio, Argentino, Korea Respubliko kaj Italio. Ne ĉeestis, sed salutojn sendis la ambasadoroj de Finnlando kaj Nederlando. (La finna kaj la itala ambasadoroj akceptis dum la posta semajno delegacion de sialandaj kongresanoj.) Aperis ankaŭ tri membroj de la Honora Komitato: prof. Jiří Hrcuba, skulptisto, d-ro Zdeněk Půlpán, dekano de pedagogia fakultato, kaj d-ro Ivo Železný, eldonisto, esperantisto.

kultura etoso



Ankaŭ la podianoj ne plu povis resti nekonataj: sidis tie, krom la kompleta UEA-estraro kaj ĝenerala direktoro Osmo Buller, Joseph Poth, estro de la eduka sektoro ĉe Unesko; vicurbestro Drábek; Vlastimil Novobilský, rektoro de la Internacia Kongresa Universitato; LKK-estro Kočvara; kaj Jorg de Mulder, vicprezidanto de TEJO.

Post klarigoj de Fettes pri la Nitobe-Simpozio (p. 147), estis laŭtlegitaj la salutmesaĝoj de Václav Havel, Prezidento de Ĉeĥa Respubliko; Boutros Boutros-Ghali, Ĝenerala Sekretario de UN; Federico Mayor, Ĝenerala Direktoro de Unesko; kaj kardinalo Miroslav Vlk, Ĉefepiskopo de Prago, esperantisto. (Vd. ĉi-apude.) Neatendita sinjoro arogis aparteni al la gravularo: akaparinte la mikrofonon, li salutis “nome de Berlinaj esperantistoj”.

Sekvis la unua plonĝo en la mondfaman muzikon de la kongreslando: kiel intermezon, Jan Duda (violono) kaj Jan Zimmer (piano) ludis “Raduzo kaj Mahulena” de Josef Suk. Tio servis ponte al la kongresa temo “Kulturo: valoro aŭ varo?”, kiun enkondukis la kunordiganto Ĵak Le Puil. Dum ni ankoraŭ tro ofte aŭdas la gurdajon laŭ kiu “Esperanto estas lingvo sen kulturo”, lastatempe eminentuloj kiel Umberto Eco ne hezitas defendi niajn valorojn — li emfazis.

Kelkajn el niaj kultur-eroj detalis Michela Lipari, invitante la kongresanojn al prelegoj, kursoj kaj aliaj programeroj. La jaman longecon de nia kultura tradicio demonstris la fakto ke Bulgara Esperanto-Teatro povis prezenti, fragmente, centjaran teatraĵon ankoraŭ ĝueblan por hodiaŭa publiko: *La unua brandfaristo* de Lev Tolstoj (vd. feb., p. 22).

Saluto de Václav Havel, Prezidento de Ĉeĥa Respubliko

Permesu al mi saluti la 81-an Universalan Kongreson de Esperanto, kies celo — la klopodo pri reciproka interkompreniĝo inter membroj de diversaj nacioj kaj kulturoj — estas por mi aparte proksima. Similaj temoj kiel tiu min ĉiam interesis.

Mi kredas ke viaj traktadoj helpos krei kampon de reciproka kompreno, aktiva agado kaj respekto, kaj tiel formi instigan medion, kiu povus proksimigi la homaron pli al ideala celo: kunvivado de ĉiuj en paco kaj harmonio.

Mi deziras al via kongreso bonan atmosferon.

Vortoj de Miloslav kardinalo Vlk, Ĉefepiskopo de Prago

Mi salutas vin kore kaj frate ĉiujn, karaj partoprenantoj de la 81-a Universala Kongreso de Esperanto en Prago, kiun mi ne povas bedaŭrinde partopreni persone. Tial mi sendas ĉi tiun mian mesaĝon.

Antaŭ ĉio mi deziras al vi ke vi gajnu belegajn impresojn el nia lando, Ĉeĥa Respubliko, kaj precipe el ĝia ĉefurbo.

Mi mem kiel esperantisto apogas vian grandan animan strebado ne nur por lingva interkompreniĝo, sed ankaŭ por vera amikeco inter homoj el diversaj kulturmedioj kaj religioj. Mia episkopa devizo estas ja “Por ke ĉiuj estu unu”.

Do, mi certigas vin ĉiujn ke mi spirite restos kun vi kaj preĝos por abundaj fruktoj de via kongreso.

Mesaĝo de d-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof

Bonvolu ricevi la tradician bonvensaluton de Zamenhof-ido. Mi tutkore deziras plenan sukceson al la 81-a Universal Kongreso de Esperanto.

Vi kunvenas ĉi-jare en la bela urbo Prago por debati gravan kaj ege aktualan temon: ĉu kulturo estas valoro, ĉu varo? Nu, la temo kulturo estas konstante ligita al la Esperanto-movado. Ja unu el la ĉefaj taskoj de la lingvo internacia konsistas en malfermo al la mondo, kaj en alproksimigo de ĝiaj diversspecaj kulturoj, sen ajna ĝeno al iliaj originalaj trajtoj.

Kvankam la tuja, senpripensa respondo de ĉiu idealisto al la tema demando estus: “Kulturo estas valoro”, tamen respondo pli pragmata, “Kulturo estas varo”, ne plu devas esti negative antaŭjuĝata. Ni difinu la koncernajn vortojn: *valoro* estas “kvalito estiminda”, dum *varo* estas “rezulto de (ekonomia) aktiveco”.

La varoj industriaj nun rezultas tamen grandparte el la aktiveco de maŝinoj kaj de aŭtomatoj; tial la mondo pli kaj pli suferas pro la malbezono de industria aktiveco de homoj. Kial do ne orienti la homan aktivecon disponeblan al kreado de *varo kulturo*? Necesas nur ke oni bone zorgu pri la “kvalito estiminda” de la varo tiel *kreata* — ne *produktata*, do ne fare de aŭtomatoj! La *varo kulturo* estu *varo valora*!

Mi bondeziras al viaj debatoj ke ili signife kontribuu al la evoluo de la kulturo, tiu plej valora riĉaĵo de la homaro, same de la nacia, ĉie ajn en la mondo, kiel ankaŭ de la internacia Esperanta kulturo, komuna bono de ĉiuj. Kaj “per laboro de la esperantoj” tiu *varo* aŭ *valoro* estu ĉefe *kulturo* de paco!

82-a UK de Esperanto Adelajdo (Aŭstralio), 19-26 julio 1997

Alta Protektanto

Lia Ekscelenco la Honorinda Sir William Deane, AC, KBE, ĉefguberniestro de Aŭstralio, akceptis esti la Alta Protektanto de la 82-a UK. En letero al Kep Enderby, prezidanto de LKK, li deziris al UEA ĉion bonan por okazigi sukcesan kongreson en la lando kie li estas reprezentanto de la formala ŝtatestro, reĝino Elizabeta la 2-a de Britio.

Kongresejo

La Adelajda Kongres-Centro, moderna konferencejo, posedas ĉion por nia perfekta gastigo. La Kongresejo situas urbocentre, je neglektebla marŝdistanco de pluraj hoteloj.

Hoteloj

LKK rezervis sufiĉajn lokojn en hoteloj de ĉiuj prezkatégorioj: de komforta kaj nekosta amasloĝejo ĝis luksaj kvinstelejoj. La prezoj estas allogaj: loko en amasloĝejo aŭ simpla ĉambro kostos ĉ. 15-20 gld.; en mezgrada hotelo ĉ. 60-80 gld.

Flugoj

UEA organizos flugkaravanojn el pluraj eŭropaj centroj, je aparte favoraj prezoj. Detaloj aperos jam ĉi-jare.

Kotizoj

Bv. noti ke la unua periodo, dum kiu validas la plej favoraj kotizoj (215 gld. por Individua Membro; 270 por ne-IM; 162 por IM en B-lando; 202 por ne-IM en B-lando; junuloj, kunuloj, komitatanoj kaj handikapuloj: IM 107; ne-IM 162; la samaj en B-tarifaj landoj: IM 81, ne-IM 121) daŭras ĉi-foje nur ĝis la fino de septembro. Bv. do urĝe aliĝi por pagi malpli!

El la pli ol averaĝa grandeco de la Praga UK sekvis ke ankaŭ pli ol averaĝa nombro da komitatanoj partoprenis la ĉi-jaran sesion de nia parlamento. Ĉeestis 74 komitatanoj aŭ rajtigataj anstataŭantoj el la 82. Kvindek el ili anonciĝis en ĉiu el la kvar plenkunsidoj.

El historia perspektivo la plej grava decido kiu rezultis el la Pragaj debatoj formale eĉ ne estas decido de la Komitato. Temas pri la Manifesto de Prago (vd. p.146), kiun la publiko de la Solena Inaŭguro aplaŭde akceptis kaj al kiu pli ol 700 kongresanoj aldonis sian subskribon. La Komitato estis kvazaŭ laborgrupo kiu benis la tekston de la Manifesto, formiĝintan en preskaŭ unujara preparado sub reĝisorado de Mark Fettes.

Por Fettes la pasintaj monatoj estis escepte lorigaj. Eĉ pli ol la Manifesto, lin ŝarĝis la pretigo de la Nitobe-Simpozio, tiel ke li apenaŭ povis dediĉi sin al la rutino de ĝenerala sekretario. Ĉar ankaŭ en la proksimaj jaroj liaj familiaj kaj studaj devoj lasus malpli da tempo al la gvidado de nia asocio, li decidis demisii kiel ĝenerala sekretario. Kolegoj de Fettes tamen sukcesis persvadi lin resti estrarano kun malpli vasta respondeco, nome pri esploro kaj dokumentado. La oficon de ĝenerala sekretario transprenis alia estrarano, Michela Lipari, tiel ke la krizo en la unujara kabineto de LEE Chong-Yeong povis esti solvita per interna redistribuo de taskoj. La Komitato akceptis tion per 46 voĉoj por, 4 kontraŭ, kaj 2 sindetenoj. Lipari ekplenumis sian novan oficon merkredon, la 24-an de julio.

Ne sen historia signifo estas ankaŭ la akcepto de du landaj asocioj: Federacio Esperanto de Bharato (Hinda Unio) kaj Vjetnama Esperanto-Asocio. Plifortiĝas do la voĉo de Azio en UEA, sub kies tegmento nun kolektiĝas 58 landaj asocioj. La aliĝpeton de E-Asocio de Serba Respubliko la Komitato ne traktis. Tradicie oni ne



Jam pli ol en la mond

emas akcepti asociojn kiuj aĝas nur kelkajn monatojn, kaj krome mankis opini-esprimo de E-Ligo de Bosnio-Hercegovino. Temas ja pri iom — kvankam ne tute — simila kazo kiel tiu de Kataluna E-Asocio (KEA) en Tampere. Pro nefinitaj intertraktoj kun Hispana E-Federacio, KEA ne renovigis sian aliĝpeton ĉi-jare.

Mark Fettes lanĉis la Manifeston de Prago, dokumenton kiu respondas al la bezono difini la aktualajn sencon kaj celon de la esperantismo en formo klara por neesperantistoj (vd. p.146). La Komitato rekomendis ĝin al la kongresanaro por subskribo.

Antaŭ la UK, el la 56 Honoraj Membroj de UEA nur 8 estis virinoj, kaj nur 9 venis el la eks-socialismaj landoj de Eŭropo. Per la anonco de la ĉi-jaraj honorigoj — s-rinoj Belka Beleva (Bulgario), Marie Bartovská, Eva Seemanová, Eli Urbanová (Ĉeĥio) kaj s-ro Zef Mjeda (Albanio) — ambaŭ proporcioj pliboniĝis. Krome, fine ankaŭ la aktora profesio ricevis reprezentigon (Beleva, Seemanová) en ĉi tiu jubilea jaro de la Esperanta teatro. En venonta numero ni publikigos biografiojn de la novaj Honoraj Membroj.

Post laŭtleĝo de la tradicia mesaĝo de L.C. Zaleski-Zamenhof (vd. p.143), Lee en nova parolado aludis kelkajn klarajn signojn de sinteno-ŝanĝo al Esperanto ĉe gravaj

instancoj. Li insistis ke necesas rajdi tiun ondon, lanĉante iniciatojn kiel la sukcesaj Ago-Tagoj, la kampanjo de Germain Pirlot ĉe eŭro-parlamentanoj, aŭ la lastatempa aktiveco de estraranoj mem pri eksteraj rilatoj.

Ĉi lastan kampon TEJO flegas tre aktive en sia tereno — ni eksciis de vicprezidanto Jorg de Mulder. Plej freŝdatas la sukceso de internaciaj laborbrigadoj, reokazigataj post plurjara paŭzo.

En la tradicie iom tumulta programero “landaj salutoj” reprezentigis 48 regnoj (ĉeestis tamen homoj el 66 landoj), laŭkutime kun unuverba frazo, kiu foje entenis inviton (kiel Germanio al la Dua Eŭrop-Unia E-Kongreso), foje raporton pri fieriga rezulto. Pro malofteco altiris la atenton salutoj el i.a. Ganao, Liĥtenŝtejno, Malagasio kaj San-Marino.

Fine, komuna kantado de “La espero” agordis la animojn al altspirita kunesto tutsemajna. ★

Post la endormiĝo de la artista asocio UALE la akcepto de E-Ligo Filatelista/Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj reportis la nombron de aliĝintaj fakaj asocioj al 9. La kategorion de kunlaborantaj fakaj asocioj eniris E-Rondo de Amikaro Bruno Gröning, Asocio de Esperantistaj Handikapuloj, Spirita Eldona Societo F.V.

100 asocioj



a organizo

Lorenz kaj Tutmonda Parolspuro-Asocio. En tiu kategorio nun estas 37 asocioj. Post Prago la UEA-familio do kunigas 104 landajn aŭ fakajn asociojn.

Prezidanto Lee prezentis al la Komitato ambician planon pri "Kampanjo 2000", cele al entagordigo de la lingva problemo kaj Esperanto ĉe UN kaj aliaj interŝtataj organizoj sojle de la nova jarmilo. Oni tamen trovis tiun celon tro altfluga, kvankam oni ankaŭ memorigis pri la neantaŭvidebleco de historio: la falo de la Berlina muro ja ŝajnis utopio nur kelkajn monatojn antaŭ ol ĝi okazis. Dum la venontaj monatoj estos ellaborata plano por kampanjo kiu unuavice celas levi la idean kaj organizan nivelojn de nia komunumo, por ke ĝi estu preta alfronti la defiojn de la nova jarcento. Tia levo urĝas ankaŭ por la kazo se la eksteraj cirkonstancoj evoluos favore al Esperanto pli rapide ol realistoj emas imagi.

La debatoj ĉirkaŭ la Manifesto kaj Kampanjo 2000 montris ke komen-

Al nova monda lingva ordo

La 81-a Universala Kongreso de Esperanto,

okazinta de la 20-a ĝis la 27-a de julio 1996 en Prago, Ĉeĥa Respubliko, kie kunvenis 2972 kongresanoj el 66 landoj,

aŭdinte la debatojn kaj rekomendojn de ekspertoj el Unuiĝintaj Nacioj, Unesko, Eŭropa Parlamento kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, kadre de la Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj pri "Lingvo por internaciaj paco kaj demokratio",

konstatinte la gravecon de la principoj esprimataj en la Manifesto de Prago, **konfirmas** la urĝan bezonon de vasta tutmonda diskuto pri la lingvaj homrajtoj, la lingva egaleco, kaj la neceso de efika kaj altkvalita komunikado trans lingvajn barojn,

emfazas ke la Esperanto-komunumo jam atingis rimarkindajn sukcesojn sur tiuj terenoj, kiuj meritas seriozan esploron de kompetentaj lingvopolitikaj instancoj kaj fakuloj,

kaj **invitas** ĉiujn internaciajn organizaĵojn kaj lingvopolitikajn instancojn al kunlaboro kun la internacia Esperanto-movado por la konstruado de pli justa kaj demokratia lingva ordo.

cas malaperi tiu konfuzo pri la irota vojo kiu en la lastaj jaroj regis la mensojn pro drastaj politikaj transformiĝoj en la mondo. Multaj jam kredis ke la diskuto pri strategio de UEA paraliziĝis en sakstrato. Certe ne estos facile krei taŭgan planon por Kampanjo 2000, sed la entuziasma akcepto de la Manifesto rajtigas al optimismo. Ĉe la bazo de nia movado estas preteco agi. La pilko troviĝas nun ĉe la gvidantoj de UEA, sed kiam ili reĵetos ĝin sur la kampon, la sukceso dependos de la landaj kaj fakaj asocioj.

Post vigla diskuto oni akceptis la Estraran Raporton pri 1995. Multan atenton ricevis la manko de laborforto en la CO. Neniu tamen vidis kie trovi rimedojn por dungi pliajn oficistojn. Por mildigi la problemon komitatano Harmon alvokis por donacoj al Volontula Fondaĵo kaj tuj enkasigis almenaŭ aplaŭdon.

Bedaŭrinde publiko preskaŭ plene mankis dum oni traktis la agadon en 1995, kvankam ĉiu ajn rajtas paroli en tiu kunsido. Krom komitatanoj, parolis nur Birthe Lapenna. Ŝi prezentis komunikon pri la Tamperea bedaŭro de John Wells, nome de UEA, pro ofendoj kaj kalumnioj kontraŭ ŝia edzo Ivo Lapenna lige kun la eventoj en 1974. Ŝi dankis pro tiu gesto, kvankam ŝi trovis en la parolado de Wells erojn kiuj ne kongruas kun la interpretoj de Lapenna en lia *Hamburgo en retrospektivo*. Konsciaj ke tio estas

kampo de historiistoj, komitatanoj ne ekpolemikis pri la vero.

La financaj diskutoj ne rabis ekscesan tempon. Oni konstatis stabilan evoluon, escepte de zorgoj pri la situacio de TEJO, kaj akceptis la financajn dokumentojn pri 1995 kaj buĝeton por 1997. Post 2-jara paŭzo oni plialtigis la bazan kotizon (MA por Nederlando) de 97 al 100 gld.

Laŭ rekomendo de la reviziantoj, la Komisiono pri Financo ricevis du pliajn membrojn, ambaŭ el Nederlando (H. ten Hagen kaj B. Venhuizen). Por asocio kun sidejo en Nederlando estas ja necese disponi pri financaj konoj de lokaj fakuloj. Inter la tri pasintjare elektitaj komisionanoj estis neniu nederlandano. La Komisiono devos pripensi i.a. ĉu eblos pli rentodone deponi la monhavaĵojn de UEA, kaj ĉu pri investoj oni povos esti pli kuraĝaj.

La Estraro de UEA kunsidis trifoje en Prago, ĉiufoje en horoj kiam plej multaj kongresanoj jam dormis. Inter la faritaj decidoj menciindas la elekto de Berlino kiel urbo de la 84-a UK en 1999.

Osmo Buller

La 7-an de aŭgusto forpasis en Torino

Ada Fighiera-Sikorska

redaktoro de *Heroldo de Esperanto*,
Honora Membro de UEA.

Ni omaĝos ŝin en nia oktobra numero.

Manifesto de Prago

de la movado por la internacia lingvo Esperanto

Ni, anoj de la tutmonda movado por la progresigo de Esperanto, *direktas* ĉi tiun manifeston al ĉiuj registaroj, internaciaj organizaĵoj, kaj homoj de bona volo, *deklaras* nian intencon firmvole plu labori por la celoj ĉi tie esprimitaj, kaj *invitas* ĉiun unuopan organizaĵon kaj homon aliĝi al nia strebado.

Lanĉita en 1887 kiel projekto de helplingvo por internacia komunikado, kaj rapide evoluinta en vivoplenan, nuancoriĉan lingvon, Esperanto jam de pli ol jarcento funkcias por kunligi homojn trans lingvaj kaj kulturaj baroj. Intertempe la celoj de ĝiaj parolantoj ne perdis gravecon kaj aktualecon. Nek la tutmonda uzado de kelkaj naciaj lingvoj, nek progresoj en la komunikad-tekniko, nek la malkovro de novaj metodoj de lingvo-instruado verŝajne realigos jenajn principojn, kiujn ni konsideras esencaj por justa kaj efika lingva ordo.

1. Demokratio. Komunikata sistemo kiu tutvive privilegiis iujn homojn sed postulas de aliaj ke ili investu jarojn da penoj por atingi malpli altan gradon de kapablo, estas fundamente maldemokratia. Kvankam, kiel ĉiu lingvo, Esperanto ne estas perfekta, ĝi ege superas ĉiun rivalon en la sfero de egaleca tutmonda komunikado.

Ni asertas ke lingva malegaleco sekvigas komunikan malegalecon je ĉiuj niveloj, inkluzive de la internacia nivelo. Ni estas movado por demokratia komunikado.

2. Transnacia edukado. Ĉiu etna lingvo estas ligita al difinita kulturo kaj naci(ar)o. Ekzemple, la lerneĵano kiu studas la anglan lernas pri la kulturo, geografio kaj politiko de la anglalingvaj landoj, precipe Usono kaj Britio. La lerneĵano kiu studas Esperanton lernas pri mondo sen limoj, en kiu ĉiu lando prezentigas kiel hejmo.

Ni asertas ke la edukado per iu ajn etna lingvo estas ligita al difinita perspektivo pri la mondo. Ni estas movado por transnacia edukado.

3. Pedagogia efikeco. Nur malgranda procentaĵo el tiuj kiuj studas fremdan lingvon, ekmastras ĝin. Plena posedo de Esperanto eblas eĉ per memstudado. Diversaj studoj raportis propedeŭtikajn efikojn al la lernado de aliaj lingvoj. Oni ankaŭ rekomendas Esperanton kiel kernan eron en kursoj por la lingva konsciigo de lernantoj.

Ni asertas ke la malfacileco de la etnaj lingvoj ĉiam prezentos obstaklon por multaj lernantoj, kiuj tamen profitus el la scio de dua lingvo. Ni estas movado por efika lingvoinstruado.

4. Plurlingveco. La Esperanto-komunumo estas unu el malmultaj mondskalaj lingvokomunumoj kies parolantoj estas senescepte du- aŭ plurlingvaj. Ĉiu komunumano akceptis la taskon lerni almenaŭ unu fremdan lingvon ĝis parola grado. Multokaze tio kondukas al la scio de kaj amo al pluraj lingvoj kaj ĝenerale al pli vasta persona horizonto.

Ni asertas ke la anoj de ĉiuj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj, devus disponi pri reala ŝanco por alproprigi duan lingvon ĝis alta komunika nivelo. Ni estas movado por la provizo de tiu ŝanco.

5. Lingvaj rajtoj. La malegala disdivido de potenco inter la lingvoj estas recepto por konstanta lingva malsekureco, aŭ rekta lingva subpremado, ĉe granda parto de la monda loĝantaro. En la Esperanto-komunumo, la anoj de lingvoj grandaj kaj malgrandaj, oficialaj kaj neoficialaj, kunvenas sur neŭtrala tereno, dank' al la reciproka volo kompromisi. Tia ekvilibro inter lingvaj rajtoj kaj respondecoj liveras precedencon por evoluigi kaj pritaksi aliajn solvojn al la lingva malegaleco kaj lingvaj konfliktoj.

Ni asertas ke la vastaj potencodiferencoj inter la lingvoj subfosas la garantiojn, esprimitajn en tiom da internaciaj dokumentoj, de egaleca traktado sendistinge pri la lingvo. Ni estas movado por lingvaj rajtoj.

6. Lingva diverseco. La naciaj registaroj emas konsideri la grandan diversecon de lingvoj en la mondo kiel baron al komunikado kaj evoluigo. Por la Esperanto-komunumo, tamen, la lingva diverseco estas konstanta kaj nemalhavebla fonto de riĉeco. Sekve, ĉiu lingvo, kiel ĉiu vivaĵospecio, estas valora jam pro si mem kaj inda je protektado kaj subtenado.

Ni asertas ke la politiko de komunikado kaj evoluigo, se ĝi ne estas bazita sur respekto al kaj subteno de ĉiuj lingvoj, kondamnas al formorto la plimulton de la lingvoj de la mondo. Ni estas movado por lingva diverseco.

7. Homa emancipiĝo. Ĉiu lingvo liberigas kaj malliberigas siajn anojn, donante al ili la povon komuniki inter si, barante la komunikadon kun aliaj. Planita kiel universala komunikilo, Esperanto estas unu el la grandaj funkciaj projektoj de la homa emancipiĝo — projekto por ebligi al ĉiu homo partopreni kiel individuo en la homara komunumo, kun firmaj radikoj ĉe sia loka kultura kaj lingva identeco, sed ne limigite de ili.

Ni asertas ke la ekskluziva uzado de naciaj lingvoj neeviteble starigas barojn al la liberecoj de sinesprimado, komunikado kaj asociiĝo. Ni estas movado por la homa emancipiĝo.

Inazō
Nitobe


La Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj pri "Lingvo por internacia paco kaj demokratio" okazis de la 20-a ĝis la 23-a de julio en Prago, paralele kun la Universala Kongreso. Ĝiaj sesioj pri "Lingvopolitiko kaj lingva praktiko", "Lingvodiverseco kaj lingva demokratio", "Lingvoj en transnacia edukado" kaj "Lingvoj en internacia komunikado" traktis temojn kiuj komune interesas esperantistojn, lingvistojn kaj politikistojn. Post la prelegoj, komentoj kaj diskutoj, ne-esperantistaj partoprenantoj havis eblon konatiĝi kun la etoso kaj programeroj de la kongreso, kun la internacia funkciado de Esperanto. Ĉi-foje ni aŭdu pri la impresoj de du el ili. En nia oktobra numero sekvos detala raporto pri la simpozio.

"Cinikeco pri Esperanto estis parto de nia edukado"

Estro de la lingva kaj kultura fako de la Universitato de Roskilde (Danio), aŭtoro de la monografio *Linguistic imperialism* ("Lingva imperiismo"), Robert Phillipson partoprenis la simpozion kun sia edzino Tove Skutnabb-Kangas, specialisto pri dulingveco kaj lingvaj rajtoj.

Kial vi akceptis la inviton al la simpozio?

Ni venis pro nia okupiĝo pri lingvaj rajtoj. Krome, la parolkomunumoj de planlingvoj ankoraŭ ne estas sufiĉe studataj de soci-lingvistoj. Ĉi tiuj komunumoj estas certe de tre aparta speco, sed, ni opinias, ne malpli studindaj ol aliaj. Tiajn esplorojn malhelpas la cinikeco pri Esperanto, kiu estis parto de nia edukado. Kaj, tamen, necesas — por tiel diri — kontraŭpezo al Holivudo!

Robert
Phillipson

La nuna E-komunumo ne sufiĉe fortas por formi tian kontraŭpezon.

Jes, tio zorgigas. Sed almenaŭ al mi persone la nuna sperto malfermis la okulojn. Espereble la rezolucioj de la Nitobe-Simpozio kontribuos al plia rekonateco de la fenomeno Esperanto ĉe aliaj sociolingvistoj.

Kiel vi mem spertis la realan funkciadon de Esperanto? Ĉu vi antaŭe konis la lingvon kaj ties movadon?

Mi jam multe legis pri Esperanto, ekzemple *Le défi des langues* ("La defio de la lingvoj") de Claude Piron, kiun mi recenzis por la faka revuo *Language in Society*, kaj ankaŭ la esperantista lingvisto Probal Daşgupto estas mia konato. Sed temis pri abstraktaj, duamanaj konoj. La UK estis mia unua reala sperto pri ĝia funkciado: sperto des pli frapa ĉar ni ĵus revenis el Honkongo, kie ni povis aŭdi, en konferenco pri lingvaj rajtoj, azianojn paroli diversajn variaĵojn de la angla. Laŭ mia observo, la Esperanto parolata de azianoj ĉi tie en Prago estas pli flua, pli facila, kaj en ĉi tiu lingvo ili havas malpli da problemoj pri la prononco.

Kion vi, verkinto de "Lingva imperiismo", pensas pri la tutmonde ludata rolo de la angla?

Nekontesteblas ĝia vigla internacia funkciado ĉe diversaj profesioj, sed la mito kiu ĝin ĉirkaŭas, estas tute malprava. Kaj ni ne forgesu la enorman diferencon inter iu lingvo kiun subtenas ekonomio kaj alia kiun vivigas nur idealismo. En la nuna cinika, komerca mondo estas bone vidi la idealismon de la esperantistoj. ★

"Pri la temo regas nescio"

Allan Wynne Jones, kimro el Britio, de ses monatoj prezidas la Eŭropan Buroon por Malpli Uzataj Lingvoj (EBMUL). Esplorado de la rilatoj inter lingvo, kulturo kaj ekonomio, li havas vastan sperton pri la komerca utiligo de la kimra lingvo.

Kio venigis vin al la simpozio?

Parte persona motivigo: antaŭ kelka tempo mi hazarde konatiĝis en brokantejo de libroj kun esperantista verkistino, Maire Mullarney. Sed, simple, mi volis esplori kiuj estas niaj komunaj agad-terenoj. Eble por iuj ŝajnas surprizo, sed ni devas iel kunlabori por instigi internacie la debaton pri lingvopolitiko, por altigi la kvaliton de



EBMUL eldonas diverslingvajn broŝurojn pri minoritataj lingvoj.

informiteco, ĉar pri la temo regas nescio inter politikistoj kaj instruistoj.

Ĉu vi jam antaŭvidas konkretan kunlaboron?

Mi ne povas tuj respondi, ĉar antaŭ decidoj necesas demokratia konsultigo. Sed mi povas imagi komunan kolokvon de esperantistoj kaj de specialistoj pri minoritataj lingvoj.

Kiel vi resumus viajn spertojn?

La speco de homoj kaj de la entuziasmo ĉi tie forte memorigas pri kunvenoj de aktivuloj por minoritataj lingvoj. Tia altruismo povas esti kaj negativa kaj pozitiva; necesas atenti pri la ĝusta miksado de idealismo kaj realismo, kiel Humphrey Tonkin diris en siaj simpozi-fermaj vortoj. ★

Mensa furaĝo

La kongresanoj kiuj plenigis la salonojn dum la du kunsidoj pri "Kulturo: valoro aŭ varo?", certe konsciis ke ili ĉeestas valoran Esperantan kultur-eron.

Ĉiu kongreso devas havi sian temon. Foje elektigas temo pasiga, alfoje tute maltrafa. La sukceso de la temo, tamen, malpli dependas de la elekto-trafeco ol de la partopreno kaj engaĝiĝo de la publiko — de tio, do, ĉu la kongresanoj sukcesas trovi kaj ĉeesti tutsemajne la temrilatajn programerojn, kutime multnombrajn. En Prago noviga formulo efikis bone kaj sprone: sufiĉis du brilaj prelegaroj unuhoraj, multnombro aŭskultataj, kiuj pli valoris ol plurtaga labirinto de subtemoj kaj laborgrupoj. Neevitebla malavantaĝo: multaj diskutemuloj devis frustrigi pro tempomanko.

Reĝisoro Ĵak Le Puil invitis siajn klerajn amikojn alporti ideojn unue

pri la temo ĝenerale, kaj, je la dua fojo, pri la rilataj demandoj "La rajto je l' kulturo: Ĉu povas ekzisti kulturo en totalismaj landoj? Ĉu demokratio garantias kulturon?"

Laŭ verkisto Manuel de Seabra, la vareco de kulturo gravas almenaŭ el unu aspekto: ankaŭ kultur-kreantoj havas stomakon. Socio normale ne kapablas vivteni ĉiujn kreantojn de kulturo. Tial ĉi tiuj devas elekti: aŭ kompromisi kun la monhavantoj, aŭ frivoliĝi sian arton por pli facile vendi ĝin, aŭ "konkeri la dignon, eĉ koste de libero".

Gilbert Ledon argumentis ke kulturo ne povas esti varo, ĉar nur per kleriĝo, ne per aĉeto, eblas akiri la kapablon aprezi kulturaĵon.



Manuel de Seabra

TAGO DE LA PACO

Ĉu planti pacarbon sufiĉas?

En la Tago de la Paco, la demando ĉu ekzistas iu "kulturo de la paco" estis diskutata vigle kaj sur la bazo de tre diferencaj individuaj spertoj aŭ nespertoj kun milito kaj aliaj formoj de malpaco.

Kiel kutime dum la pasintaj jaroj, en kiuj Mark Fettes organizis kaj gvidis la aranĝon en la nomo de Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo, la Tago de la Paco — duhora aranĝo en plenstopta salono — rilatis al la kongresa temo.

Enkonduke Mark Fettes ligis la temon al la celoj de Unesko. Li atentigis pri la kvar dimensioj de ties aktuala laborplano: la edukado al paco, interkompreniĝo kaj toleremo; la plifortigo de homaj rajtoj kaj demokratio; la dialogo inter kulturoj; kaj la prevento de konfliktoj aŭ postkonflikta pac-konstruado. Li starigis plurajn demandojn, plej grave tiun pri la ĝenerale agnoskata (aŭ ĉu nur asertata?) toleremo de esperantistoj: ĉu ili restas netuŝataj de maltoleremo kaj indiferento jam pro sia elekto de Esperanto kiel unu el siaj lingvoj, aŭ ĉu ili tamen bezonas pluan edukadon al interkompreniĝo kaj toleremo? Kaj kiel tia edukado okazu?

La japana ĵurnalistino Krizantemo (Kazuko Kikusima) vidis la respondon en la tre praktika agado helpe al suferantaj landoj. Ŝia vojaĝo al Sarajevo, mallonge antaŭ la kongreso, kondukis ŝin interalie al du personaj konkludoj: la unua, sobra kaj kruela, estis ke la detruita urbo ne vere ŝokis ŝin, ĉar ja milito estas tia afero; la dua estis la sento ke, malgraŭ ŝia komenca senhelpeco de individuo apud la grandaj mondonacaj organizoj internaciaj, ŝia persona helpo al la lokaj esperantistoj havis apartan signifon, ĉar esperantistoj, laŭ ŝiaj spertoj, ne ekskludas alireligianojn el siaj helpagadoj kaj do vere estas ĝenerale pli toleremaj. Ĉiu povas helpi: per leteroj al tieaj samlingvanoj, per aĉeto (ĉe UEA aŭ aliloke) de libroj eldonitaj de E-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, aŭ per mondonacoj (al Konto Espero ĉe UEA, aŭ al la konto "elbh-j" de ELBiH).

En la plua diskuto Wim M.A. De Smet (Belgio) menciis ke li estos observanto dum la elektoj en Bosnio. Ronald J. Glossop (Usono) rimarkigis ke dum la praktika helpado oni ne forgesu pensi pri la kaŭzoj de milito, ĉar sen tio sukcesa prevento ne eblas. Sekve, akran diskuton kaŭzis ies demando ĉu jam planti pacarbon aŭ starigi pacmonumenton en iu sekura mondeparto povas iel helpi. Iuj asertis ke nun gravas la transvivo de la suferantoj en militaj regionoj kaj do materia helpo, dum aliaj hezitis kiel elekti la celatojn de sia helpo, ĉar, krom la militaj suferoj, multaj suferas de malsato kaj malsanoj.

Tamen oni almenaŭ konsentis ke la edukado al paco, en la plej larĝa senco, devas resti sur la tagordo: en lernejoj, en la ĉiutaga vivo kaj ĉe Esperantaranĝoj. Kiel ekzemplon Ursula Grattapaglia (Bona Espero, Brazilo) menciis ke la Tria Amerika Kongreso en februaro vizitis la UN-Universitaton de Paco en Kostariko.

En la fino, la ĉeestantaj membroj de Monda Kunagado diskutis la staton de la asocio kaj alvokis al pli aktiva kunlaboro en ĝia restarigo kaj en ties konkretaj porpacaj projektoj.

Ulrich Becker (Germanio)

Referencante al Karlo Markso, YAMASAKI Seikō atentigis ke la premisoj mem de la diskuto ne estas terminologie klaraj: kio estas valoro, kio estas varo?

Jean-Pierre Danvy, akceptante la PIV-an difinon de "varo" ("objekto, fabrikita por vendado..."), opiniis ke kulturo ja estas varo, "feliĉe, feliĉe, feliĉe", ĉar tiu objekta vareco garantias la transvivon de kulturaĵoj. Valoro, plue laŭ PIV, estas "tio, kion homoj juĝas morale aŭ estetike grava"; rimarkinde ke tiu "aŭ" implicas konflikton fekundigan por kulturo.

Stefan Maul atestis laŭ propra ĵurnalista sperto ke, sub la efiko de ĉiam plia profitemo de la amas-komunikiloj, kulturaĵoj estas hodiaŭ pli kaj pli konsiderataj nur kiel varoj en merkato regata de la leĝo pri oferto kaj mendo.

En la diskuto, poeto Nicolino Rossi alportis fortan subtenon al la vidpunkto de Ledon: akcepti ke oni ĉiam devas

pagi por kulturo estas akcepti diskriminacion de malriĉuloj.

En la dua kunsido, kiu ekzamenis la rilatojn de kulturo al totalismo kaj demokratio, Aldo de' Giorgi memorigis ke la malpermeso sin esprimi libere povas esti sprono pli ol bremsilo, kaj ke, "bedaŭrinde sed vere, ĝenerale diktatoroj pli investas en kulturo ol demokratioj". Tamen, "la libera fluo de la homa penso" ne dependas de politikaj reĝimoj.

De Seabra konsentis ke kulturo floras en totalismo, ĉar tie kulturo funkcias kiel batalilo kaj esprimilo de kontraŭ-reĝima solidareco. Sed kulturon garantias nek demokratio nek diktaturo — ĉiam nur la individuo.

Laŭ Ledon, demokratio ne sufiĉas por bonfartigi kulturon: ĉie ja okazas ke la varoj kiuj pretendas esti kulturaĵoj nur manipulas kaj kondiĉas la homajn mensojn. Ni glutas, kvazaŭ sklavaj bestoj, tiun "mensan furaĝon" — eĉ en Esperanta kongreso. Por aŭ-

tente ĝui kulturon, necesas ke la individuo atingu pli da libero per memregado.

Post kelkaj rimarkoj de Yamasaki ("demokratio ne garantias la plej saĝan politikon", ankaŭ ne plej saĝan kulturpolitikon) kaj Maul (ĉu ne ankaŭ konsumismo estas totalismo, sed ekonomia?), Tyburcusz Tyblewski finis la vicon de prelegetoj. Vivinte kvindek da jaroj en komunismo, li atentigis ke totalismo kulturon ne nur spronas, sed ĉefe detruas, persekutante alie-pensantojn. Demokratio signifas la rajton pensi alie — rajton kiun Ivo Lapenna defendis, je tondraj aplaŭdoj, en la inaŭguro de la Budapeŝta UK (1966), kiam ambasadoro de Orienta Germanio misuzis la okazon por politika propagando.

Kiom da kapoj, tiom da opinioj. La kunvenintoj disiris kun vortoj de Tatu Huzimoto: "Civilizo pli gravas ol kulturo. Dank' al ĝi ni satas."

István Ertl

INTERVJUO KUN REINHARD SELTEN

"Post jardekoj ne multo ŝanĝiĝis"

Post longa paŭzo, la Nobel-premiita sciencisto Reinhard Selten denove vizitis UK-on. Ni demandis lin kiel li fartis en Prago.

Kiam vi laste partoprenis UK-on?

Antaŭ jardekoj. Poste pro devo profesiaj la dato de la kongreso neniam taŭgis por mi. Nun, post ĉi-jara retiriĝo el la universitato, mi havas liberan tempon.

Kian diferencon vi trovas inter la iamaj UK-oj kaj la nuna?

Ŝajnas ke tiam estis pli da kunvenoj, pli densa programo. Sed eble mi eraras, ĉar oni ja idealigas siajn memorojn. Alie, ne multo ŝanĝiĝis.

Sed almenaŭ premieris la Nitobe-Simpozio.

Jes, tre bona aranĝo. La neesperantistaj partoprenantoj estis impresataj kaj interesataj. Mi esperas de ĝi efikon ĉe internaciaj organizoj kaj ĉe sciencaj rondoj okupiĝantaj pri lingvopolitiko.

Ĉu via propra rolo en la simpozio ne estis nur dekora, prestiĝodona?

Efektive jes, kvankam mi kunparolis ĉe la ronda tablo. Por mi persone kelkaj prelegoj estis tedaj pro relativa senenhavenco. Nu, mi ne kutimas pri sciencaj simpozioj ĉi tiaj, ĉar mi la-

boras per matematikaj modeloj. Fakte, la simpozion oni ne juĝu laŭ pure sciencaj kriterioj, ĉar ĝi ne povis esti pure scienca aranĝo: iuj prelegoj ne estis referaĵoj, sed raportoj de organizoj pri sia agado.

Via alia, ĉefa kontribuo ĉi-kongrese estis la prelego kaj kurso pri ludo-



Reinhard Selten kun sia edzino Elisabeth dum la Nitobe-Simpozio

teorio. Vi ne kutimas paroli pri la temo Esperantlingve. Ĉu tio kaŭzis al vi problemojn?

Jes, dum la preparado, ĉar ofte la bezonataj vortoj ne ekzistas, aŭ estas malfacile troveblaj kaj apenaŭ konataj. Eĉ en la angla, kiu estas la ĉefa laborlingvo de ĉi tiu sciencobranĉo, oni ofte devas krei novan vorton por nova koncepto, aŭ doni novan sencon al vorto jam ekzistanta. En la angla mi tion ofte faris.

Kiun nivelon havis la prelego kaj la kurso? Ĉu la publiko bone akceptis ilin?

La dimanĉa prelego estis populariga. Mi jam faris saman prezenton en Murcia, Hispanio [vd. majo, p. 98], sed ĉi-foje mi havis pli da tempo, ĉar interpretado ne necesis. La merkreda ses-hora prelegaro estis io nova, io kion mi neniam faris. Malfacilas doni sciaron iel kompletan en tiel mallonga tempokadro. Mi celis facilan kurson, kiu tamen kapabligas al solvo de simplaj kalkulaĵaj problemoj. Partoprenis ĉ. 70 homoj; je la fino okazis ekzameno, kiun 4 trapasis sukcese.

Ĉu ni vidos vin en venontaj UK-oj?

Verŝajne ne en Aŭstralio, sed poste jes, denove. ★

Unua lingvopolitika seminario

La unua seminario de UEA pri lingvopolitiko okazis sabate, antaŭ la malfermo de la UK, kaj allogis ĉ. 90 kongresanojn.

Interkonsulte kun la komisionanoj Mark Fettes, Amri Wandel kaj YAMASAKI Seikō, mi organizis ĝin sekvante la lastjaran rezolucion de la Komitato pri lingvopolitiko. Ĝia celo estis, surbaze de la konceptoj esprimitaj en ĉi tiu revuo (majo, p. 89-90), konkrete trakti pri kvar difinitaj lingvopolitikaj temkompleksoj:

Pri bazaj konceptoj de lingvopolitiko kaj lingvoplanado en etnaj lingvoj enkonduke prelegis prof. Humphrey Tonkin, pri *ekzemploj el la japana* informis YAMASAKI Seikō, kaj pri la *(nov)hebrea* prof. Amri Wandel. Ĉi tiu enkonduka parto celis konsciigi nin pri la ekzisto de lingvopolitiko kaj

lingvoplanado ĉe etnaj lingvoj, el kies ekzemploj oni eble povus lerni por Esperanto.

La rolon de planlingvaj akademioj prilumis d-ro Sergej Kuznecov, kiu prezentis tipologion de tiuj institucioj. D-ro Werner Bormann skizis siajn vidpunktojn pri la *estonta laboro de la Akademio de Esperanto*.

La atenton de la Akademio devus tuŝi ankaŭ la temo de d-ro Renato Corsetti. Elirinte el siaj familio-lingvaj spertoj, li atentigis pri la observebla *kontraŭdiro inter personaj lingvaj gustoj kaj la oficiala lingva normo*.

La leksikografio en Esperanto estas aparte grava tereno. *Tipologion de*

ĉefaj etnolingvaj vortaroj prezentis prof. John Wells, kaj tiel, nerekte, li komprenigis al la aŭskultantoj ke multo estas farenda por pli bone evoluigi la Esperantan leksikografion.

Fine Mark Fettes substrekiis la neceson ellabori koheran lingvopolitikon kaj prezentis ideojn por realigi ĝin.

La kontribuoj vekis tre viglan diskuton, kvankam la disponebla tempo neniel sufiĉis. Estas planite eldoni la materialon kaj organizi pluan seminario, sed kun pli limigita temaro. Portempa komisiono de la Komitato de UEA pri lingvopolitiko serĉos vojojn por plu okupiĝi pri tiu temo. Ĉe tio la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) kaj la Akademio de Esperanto certe devos ludi aparte aktivan rolon.

Detlev Blanke (Germanio)

Kulturo ekskluzive nia

“Esperanto kaj kulturo – sociaj kaj lingvaj aspektoj” – la temo indikas ke la 19-a Esperantologia Konferenco, aparte longdaŭra, tuŝis ne strikte lingvistikajn kampojn de esperantologio.

Plene prizorgita de d-ro Detlev Blanke, la aranĝo sukcesis doni ege vastan panoramon pri la kulturaj aspektoj de Esperanto.

D-ro Zbigniew Galor (“Esperantomovado – ĉu perdita komunumo? Sociologie pri la specifeco de la Esperanto-komunumo”) klare priskribis la multkolorajn alportadojn kiujn esence kapablas doni ĝia diaspora disvastiĝo.

La evoluadon de Esperanto, estigitan ĝuste de tiuj kontribuoj, ilustris sekve Mark Fettes (“Infano de l’ epoko; Moderneco kaj postmoderneco de la Esperanto-kulturo”) per trafaj ekzemploj kaj mencioj.

Nikola Rašić demonstris “Kiel lingvo generas kulturon”, emfazante ke krom referenca funkcio (rilatigo al eksterlingvaj objektoj) ĉiu lingvo havas ankaŭ simbolean funkcion, estante integrad-faktoro de sia lingvokolektivo. En Esperanto ĉeestas kvar



Esencaĵoj de nia kulturo, plus panoramo de Prago, estis ĝueblaj en la Libroservo.

kulturtavoloj: la universala, la internacia, la nacia kaj la pseŭdo-nacia, kiuj en diversaj formoj de interagado kreas novan aŭtentikan kulturon.

Substrekte ke “*kulturo* estas ĉio kio ne estas *natur*”, Gerrit Berveling (“Kio estas E-kulturo, kaj kio ĝin karakterizas?”) atentigis pri la apartaj kultur-grupoj kiuj ĉeestas en la nuntempa multfaceta mondo. Ili estas “komune spertitaj dividitaj memoroj”, kaj tiusence ankaŭ E-o estas sumo de spertoj de tutmonda homaro, kvazaŭ esprimo de iu homaranismo. La posta elpaŝo de d-ro Tišljar akcentis la rolon de etnaj kulturoj en Esperanto.

La lasta prelego, de d-ro Aleksandr Melnikov (“Originalaj E-kulturaj fenomenoj kaj ilia lingva reflektiĝo”), celis evidentigi kiuj estas la “kulturŝarĝitaj vortoj” — tradukeblaj en etnolingvon nur per parolturno — specife Esperantaj, de “krokodili” ĝis “Sankta Netuŝebleco”.

Pli bone ol per tiaj artfajraĵecaj mencioj ne eblis fermi la ĉi-jaran Esperantologian Konferencon, dum kiu sinsekvaj prelegoj logike kapablaj konfirmi, en la ĉeestantoj, la esencon de kulturo *ekskluzive nia*.

Giuseppe Valente (Italio)
Laŭ La Eta Gazeto

Akademio sen slipetoj

En la publika kunsido de la Akademio de Esperanto (AdE) 13 akademianoj de diversaj aĝoj, kun ĉekape prezidanto Werner Bormann, alfrontis demandojn el ĉ. 80-persona aŭskultantaro.

Amri Wandel proponis debaton pri la dezirinda rolo de la Akademio (*direkti* aŭ *sekvi* la evoluon, *dikti* aŭ *konsili*?) kaj pri la kontaktoj inter AdE kaj la parolantaro.

Unue komentis akademianoj Berveling kaj Lo Jacomo. Laŭ Berveling, AdE devas servi la movadon, konsciigante pri tio kio estas bona Esperanto. Lo Jacomo opiniis ke AdE plie traktu principajn demandojn ol decidi pri unuopaj vortoj.

Kontraste al la pli frua praktiko, kiam la publikanoj sendis al la podianoj (lingvajn) demandojn sur slipetoj, nun oni povis simple alparoli ĉi tiujn, metodo kiu montriĝis efika kaj kontentiga post la komenca hezito, kiun rompis A. Pettyn per la demando: "Ĉu ni entute bezonas la Akademion?".

La ĉefaj ideoj esprimataj estis:

Ni bezonas Akademion, sed tian kiu efektive laboras (E. Tvarožek). Ankaŭ pli frue ĝi multe laboris, kion dokumentas ĝiaj aktoj, sed la publiko ne ofte legas tiujn (akademiano A. de' Giorgi). AdE, kiu mem elektas sin, restas fermita rondo, izolita de la ordinaraj E-parolantoj (Anna Löwenstein; similan ideon esprimis Humphrey Tonkin en la lingvopolitika seminario). AdE prilaboru ne novajn vortojn sed novajn konceptojn; ĝi oficialigu novajn vortojn, sed nur post zorga kribrado (Löwenstein). AdE ne daktu sed rekomendu. Ĝi sekvu mezan vojon inter ĝisosta fundamentismo kaj troa neologismemo (O. Prytz). Laŭ pluraj, AdE ĝis nun ne plenumis sian rolon de *konsilanto*; ĝi estis pasiva kaj apenaŭ videbla por la publiko.

En siaj konkludoj, Wandel rekonis ke antaŭe la publiko ne sufiĉe aŭdis pri la Akademio, sed tio jam ŝanĝiĝas, i.a. pro la ofta rubriko de AdE en ĉi tiu revuo.

Josef Šemer kaj Amri Wandel (Israelo)



Superplena lekcio dum prelego de Internacia Kongresa Universitato

Sprone al faka agado

Faka ĝiĉeto, Faka kaj Scienca Forumo — jen novaj aranĝoj kiuj, aldone al la pli ol 60 ĉi-rilataj programeroj de la UK, helpis fakajn asociojn interkonatiĝi kaj konigi sin al la vasta publiko.

Sekvi la evoluantan mondon de scienca esploro kaj faka terminologio — jen defio esenca por Esperanto. La atingoj en la faka kaj scienca kampoj aparte gravas por la informado pri Esperanto kaj en niaj rilatoj kun internaciaj organizoj. Tio denove montriĝis en dumkongresa gazetara konferenco kaj en sesio de la Nitobe-Simpozio, ambaŭ dediĉitaj al la temo.

En Prago kvar fakaj asocioj (FA-j) establis kunlaborajn rilatojn kun UEA (vd. p. 145), kaj pluraj esprimis intereson pri tio.

Multaj FA-j utiligis la novan fakan ĝiĉeton, kiun UEA senpage disponigis al ili dum la tuta kongreso: i.a. medicinistoj (UMEA), Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), la religikompara asocio ASISTI, Amikaro Bruno Gröning, Asocio por la Enkonduko de Nova Biologia Nomenklatur, handicapuloj (AEH) kaj verduloj (AVE). La divido de deĵortempo kaj la sistemo de propra mastrumado bone funkciis; oni plendis nur pri manko de spaco.

La nova iniciato Faka kaj Scienca Forumo, celanta sinprezenton kaj spert-interŝanĝon de FA-j, allogis

okdekon da reprezentantoj de pli ol 30 asocioj, tiel ke same la salongrandeco kiel la 90-minuta daŭro antaŭviditaj montriĝis malsufiĉaj. Ni menciuj nur kelkajn el la ideoriĉaj kontribuajoj al la forumo:

J. Ryznárová legis longan mesaĝon de la AEH-prezidanto, pledantan por faciligo de la kongresaj kondiĉoj por handicapuloj. Marija Belošević, sekretario de ILEI, invitis FA-jn al kunlaboro, ekz. per konstruo de edukaj programoj en sia fako. Prof. Støp-Bowitz parolis pri la plej malnova FA de la movado, plej longdaŭre aliĝinta al UEA: Internacia Scienca Asocio E-ista, kiu venontjare festos sian 90-jariĝon. Prof. Helmar Frank prezentis AIS, kiu lastatempe aprobis novan regularon por siaj studsesioj. (En Prago la unuan fojon okazis komuna inaŭguro de Internacia Kongresa Universitato kaj AIS-studsesio.) Christian Darbellay pledis por daŭrigo de la aktiveco de Terminologia E-Centro — tiutema laborteamo estis starigita poste, kadre de la komitata komisiono pri lingvopolitiko.

Amri Wandel

Estrarano pri faka kaj scienca aplikado

De Silfer al Zamenhof

Belka Beleva kun sia trupo, Bulgara Esperanto-Teatro (BET), post kvar jaroj denove vizitis UK-on.

BET ludis du unuaktaĵojn rimarkindajn jam pro sia aŭtoro, resp. sia protagonisto: *Triptiko* de Giorgio Silfer kaj *Lanĉo* de Emilija Lapenna.

Silfer, kiu ne kutimas viziti UK-ojn, ĉeestis per teatraĵo premierinta pasintjare en Bulgario. En la drameto hazarde renkontiĝas en “Universala Virina Kongreso” tri sinjorinoj, havintaj amrilaton kun la sama viro, verkisto. Ties personeco devus eble elvolviĝi el iliaj vortoj kaj el liaj verkoj, kiujn la virinoj citas. Tamen, plie elvolviĝas la historio de tri amoj al nekonata viro. Interesa, sed ĉu temas pri dramo — aŭ deklamo? La verko estas bela pro la brilega stilo de Silfer, kiun elstarigis la talenta ludo de Veneta Zjumbjuleva, Belka Beleva, Luna Davidova, kaj la majstra reĝisorado de Teo Jurukov.

La ĉeffiguro de *Lanĉo* estas persono kiu en la lastaj tempoj de reviviĝantaj naciismoj fariĝis malagrable por pluraj esperantistoj: Eliezer (= Lazaro, poste Ludoviko) Samenhof (poste Zamenhof). Se iu kontestus tion, mi memorigu ke oni ne sufiĉe ofte mencias inter la agnoskoj de Esperanto ĉe Unesko la decidon de ties Plenum-

komitato inkluzivigi LLZ en liston de grandaj personecoj kies datrevenon Unesko rekomendis marki en 1960; aŭ tion ke lia nomo *mankas* el la Manifesto de Prago.

La soleca heroo de ĉi tiu pli drameca verko estas la Varsovia oftalmologo kiu aŭdacis publikigi broŝuron por proponi alternativan solvon al la komunikada problemo de la homaro (ludis Nikolaj Uzunov). La nekompreneman, konformisman socion reprezentas lia patro Marko, homo konservativa kaj aŭtoritata (Ivan Zlatarev). La unuan subtenas la familianoj Klara (Veneta Zjumbjuleva), Felikso (Ivelin Andreev), Roza (Belka Beleva) kaj patro Zilbernik (Teo Jurukov). Ĉiu esperantisto povas kunsenti kun la Majstro, ja la drama konflikto plu aktualas: malgraŭ pozitiva ŝanĝo en la ĝenerala situacio de Esperanto, la socio restas pri ĝi same nekomprenebla. Kvankam el tiu konflikto la verko malmulte povas sentiĝi, ĝi restis interesa en bona ludado de BET kaj gratulinda reĝisorado de Teo Jurukov.

Péter András Rados (Hungario)

Arton respektu

La profesia kuba aktorino Georgina Almanza ludis antaŭ pli ol cent spektantoj.

Kondensitan version de ŝia kabareta programo, el poemoj kaj kanzonoj de diversaj aŭtoroj, sekvis post la paŭzo la monodramo *Lordino Makbeto en koncert-kafejo* de moderna kuba aŭtoro, Carlos Francos. Ĉar ŝi devis ludi en tute ne taŭga salono kaj prezenti en unu horo du tute malsamajn teatrajn erojn, oni povis komplete ĝui nek la kabareton nek la dramon. Domaĝe, ĉar Georgina Almanza estas talenta kaj sperta aktorino, kaj ŝiaj tekstoj estas valoraj. Mi ĉefe bedaŭras ke oni ne plene profitis la interesan monodramon inspiritan de Ŝekspiro, kiun Francos lerte konstruis pri la perfida influo de teatro sur la privata vivo de aktorino rolanta lordinon Makbeto.

Se oni decidus venigi — koste kaj komplike — artistojn el landoj malproksimaj de la kongresa urbo, normala signo de respekto por ilia arto kaj por la publiko estus garantii bonajn kondiĉojn por iliaj prezentaĵoj. Sen tio, restas al ni amara impresado de nekompleto kaj malŝparado.

Saša Sirovec (Francio)

Bonordaj stilprofiloj



La enhavo ampleksis du banalajn okazaĵojn, adjektive spicitajn, kun aŭtobusa kaj halteja situo — ĉio resumebla en 104 vortoj, laŭ disdonita

program-folio. Sekve la sukcesigo de la 25-minuta drameto dependas preskaŭ ekskluzive de stilo. Ja temas pri *Stilekzercoj* de Raymond Queneau,

aktorita de anoj de Studenta Esperanto-Klubo de Zagrebo.

La folio listigis la 18 interpreto-stilojn laŭ kiuj roluloj sinsekve kaj monologe interpretis la okazaĵojn: jen heziteme, recenze, feminisme, poetece, infanece ktp. Dum unu monologis, ceteraj trupanoj mimis aŭ voĉumis apoge. La trupo malfrue kaj iom malforte komencis la prezentaĵon, malhelpite de la enormeco de la salono. Tamen la publiko kaptis la nekutiman sencon de la afero. Ja, iom post la deka stilo formiĝis penso: “Nu, interesa ideo, amuzaj eroj, sed ĉu ni ien iras?” Feliĉe la reĝisoro pripensis tion kaj zorge ordigis la stilojn, renomante iujn kaj lasante la plej impresajn ĝis la fino. Ekde la te-trinka “angloŭ” la publiko varmiĝis, kaj ĉiu ero superis la antaŭan. La dramistoj eĉ aŭdacis krei du proprajn stilojn: *Tra-tra*, kaj tiun trafan por forta fino, *frape-rape*.

Stefan MacGill (Hungario)

Ni vidis reĝinon

Pri Eva Seemannová mi plurfoje aŭdis: Honora Membro de Ĉeĥa E-Asocio kaj nun ankaŭ de UEA, de jardekoj teatre aktiva — ŝi faris tro multe por listigi ĉion.

Do kun grandaj atendoj mi iris spekti ŝin en *Mi, Eliza Premiŝlida, reĝino ĉeĥa*, dramigo de novelo pri la lasta ĉeĥa reĝino de la Premiŝlida dinastio (1292-1330), historio al mi — kaj supozeble al multaj — absolute nekonata. Unuavide stranga elekto: kial mi estu emocie trafita de intrigoj de homoj el foraj tempoj, kies nurajn nomojn estis malfacile kapti kaj memori? Tamen, Eva Seemannová ludis tiel konvinke ke mi plene forgesis kie mi estas. Mi vidis, vere *vidis* junan virinon kiu baraktas por sia dinastio, por sia infano kiu estos la savanto de sia popolo. La aktorinon kiu jam aktivis en la 50-aj jaroj mi tute ne plu vidis. La historiajn detalojn mi plejparte forgesis — sed ŝiajn klopodojn kaj ŝiajn suferojn mi ne tiel rapide forgesos.

Gerrit Berveling (Nederlando)



Eva Seemannová

Magia rido

“Abrakadabra sinsalovim!”

La germana prestidigitisto Trixini, jam fama tra Esperantio, kondukis kelkcent kongresanojn al alia mondo, sorĉante la spektantojn ne nur per sia magia lerto, sed ankaŭ per siaj ĉarmo kaj sprito.

Spektantoj oferis siajn brakhorloĝon, kravatton, edziniĝan ringon, eĉ maldekstran manon al la magio de Trixini. Post streĉaj minutoj la tondita kravato ripariĝis, la ringo retroviĝis kaŝita en serio da skatoloj, kaj, feliĉe, la mano restis integra parto de la korpo, malgraŭ la kompatinda sorto de kukumo distranĉita sub ĝi.

Ĉion ebligas, laŭ la magiisto, lia blua ŝtono kaj la neelĉerpebla magia akvo el Paderborn. Nu, preskaŭ ĉion. Kiam li estas “iomete nervoza”, necesas ankaŭ iom da magia salo (tri skuoj de supre, unu de malsupre).

La magiaĵoj kaj sprito de Trixini ŝajnas same neelĉerpeblaj kiel lia magia akvo. Ridoj eĥis samlaŭte kiel miraj aplaŭdoj. Oni facile kredas lian aserton ke li prezentiĝis en pli ol 50 landoj. Ĉu li eble eĉ ne bezonis aviadilon por tio? “Hokus pokus, trifoje nigra kato!”

Joel Brozovsky (Japanio)

Ravo kaj rido

“Fraŭlino Emily Barlaston” distris la kongresanaron dum 90 kabaretaj minutoj.

Temis pri la kutima miksaĵo el parodiaj prezentoj de kantoj (ĉefe operetaj) kaj ŝercoj (ofte pri konataj, ĉeestantaj esperantistoj). Grandan parton de ŝia prezento plenigis ludado de scenoj el *Mazi* kun la partoprenado de deko da volontuloj el la spektantaro. Tiu ero bone funkciis, sed iom tro longe daŭris laŭ la gusto de multaj spektantoj.

Certe la ĉefaj meritoj de la Fraŭlino estas ŝia brila sursceneja karaktero de angla damo kaj la mirinda voĉo, per kiu ŝi kapablas laŭvice ravi kaj ridigi. Ŝia interpreto de “Somertempo” estus laŭ mi elstare amuza eĉ sen la komika rekvizito de kaŭĉuka kokino.

Edmund Grimley Evans (Britio)

Bela aŭskulto, ĝua kompreno

Dum horo kaj duono siajn koruskantojn prezentis la seppersona nederlanda ensemblo Akordo.

La kantgrupo — el tri viraj kaj kvar inaj voĉoj tenora, basaj, aldaŭ kaj sopranaj — ravis la kelkcentopan spektantaron per siaj bele trejnitaj kaj varmtone emocivekaj voĉoj tra varia repertuaro: ekde la mezepokaj kantoj al moderna folkloro, ekde popolkantoj priamaj, batalaj, porliberaj ĝis rokmuzika ĝenro.

La koncerto ekis per tradicia dek sesajarcanta vinkanto francdevena, polifonie voĉigita kun tuja evidentigo de taŭga, skandohava prononco Esperanta, kiu tuj ĝuigis la komprenon. Sekvis la gaja “Printempas...” pri maja, angla gejunula senzorgemo, en plaĉa ritmo kaj kunagordo de la voĉoj. Envicigis aventuraj kaj liberamaj kantoj sud-afrikaj kaj alilandaj, kenja

lulkanto, kanto pri soleco laŭ modernusona “Solecas mia voj”. La versoritmaj ĉie bele substrekis la melodio, etosigante diversnuance ĉiun unuopan kanton, ĉu polifonie ĉu kapelĥore prezentatan.

En la dua koncertparto reliefigis plaĉaŭskulte la kantoj “Per biciklo tra la pluv” usondevena, “La bosko fraksena” laŭ kortuŝe kimra melodio, la priesperanta “Stelo kvinpinta”, kaj “Damo mia kara”, amindumkanto de Orlando di Lasso (16-a jc.), Esperante envortigita de Dario Besseghini.

Koncertofine la publiko longe aplaŭdis admire kaj kuraĝige la koruson Akordo, kies kompakta disko samnoma povos reĝuigi la frandemulojn.

Nicolino Rossi (Italio)

Meze de granda familio

La celo de Solena Fermo estas resumi tutan semajnon da kongresaj eventoj kaj spertoj. Tamen, ekzistis kongresano por kiu la UK nur ĵus komenciĝis.

TEJO-prezidanto Danny ten Haaf enkondukis afrikanon, kies saluto mankis en la inaŭguro. La ĉeesto de Victor Nto Nto, ĵus alveninta el Kamerunio, dankeblis al Fondaĵoj Saliko kaj Espero. Li nun faris la saluton, kaj petis helpojn por plilongigi sian ĵus komencitan restadon en Ĉeĥio.

El la podiano (la estraro, ĝenerala direktoro Buller, ten Haaf, IKU-rektoro Novobilský kaj LKK-estro Kočvara) paŝis antaŭen Michela Lipari, ĝenerala sekretario ekde tri tagoj, por raporti pri la kongreso. Ŝi rimarkigis ke la 1972 aliĝintoj el 66 landoj ne signifas la tutan kongresanaron: ne nur ke, se ni aldonus la unutagajn vizitintojn, la nombro superus 3000, sed ankaŭ, pli grave, dank' al la konstanta raportado de Pola Radio esperantistoj de tuta Eŭropo povis sekvi la okazaĵojn en Prago.

Wandel emfazis ke Prago premiere vidis komunan inaŭguron de Internacia Kongresa Universitato kaj de studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj. Novobilský dankis pro la vigla atento al la IKU-prelegoj; efektive, dum kelkaj el ili (kiel de Boulton kaj de Nervi) aŭskultantoj okupis ĉiun angulon, ĉiun kvadratan decimetron de la preleg-salono.

Anstataŭ doni propran takson pri la Nitobe-Simpozio, kunorganizinto Fettes citis vortojn de simpozianoj: "Ĉi tie mi sentis min meze de granda familio, en kiu mi estis unu el la membroj." (Françoise Cestac, eksa asista ĝenerala sekretario de UN) "Se en la venontaj jaroj Esperanto revenos en la diskutoj, mi ne plu sentos emon ridi, ĉar mi komprenis ĝian seriozecon." (Marie-Josée de Saint Robert, sekciestro pri terminologio kaj teknikaj dokumentoj ĉe UN en Ĝenevo) "Ankaŭ estonte vi povos kalkuli pri la subteno de Unesko." (Joseph Poth, Eduka Sektoro de Unesko) "Ne estos facile, sed reale eblos varbi por Esperanto pli da eŭro-parlamentanoj." (Olivier Dupuis, ĝenerala sekretario de Transnacia Radikala Partio, eŭro-parlamentano)

"Parolantoj de malgrandaj lingvoj kaj de Esperanto devas pli kunlabori por instigi debaton." (Allan Wynne Jones, prezidanto de Eŭropa Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj) "Mi de longe subtenas la agadon de esperantistoj por lingva egaleco." (Yvo Peeters, specialisto de prilingvaj leĝoj) "Kvankam mi multe legis pri Esperanto pli frue, la eblo atesti ĝian funkciadon estis la plej konvinka sperto el ĉiuj." (Robert Phillipson, vd. p. 147) "Kiam ni iros hejmen, ni lernos Esperanton." (Tove Skutnabb-Kangas, vd. p. 147)

Post voĉlego de la kongresa rezolucio, sekvis komunikoj pri la aljuĝo de diversaj premioj. Fondaĵo Grabowski premiis en ĉi tiu teatre jubilea jaro la



Michela Lipari, nova ĝenerala sekretario de UEA

aktorinojn Belka Beleva kaj Jadwiga Gibczyńska (po 450 usonaj dolaroj) kaj la geedzojn Jerzy Fornal kaj Zofia Banet-Fornalowa (250 dolaroj). Krome ĝi atribuis subvencion al Fondaĵo Afriko pro ties dua eldono de reviziita Esperanta-suahila vortaro (501,50 dolaroj) kaj al la eldonejo Kava-Pech (214,93 dolaroj). Ankaŭ Subvencio Cigno iris al vortaro, sed ĉi-kaze aperonta: Cigno devos helpi la ŝtopadon de enorma breĉo. Nome, la araba lingvo, unu el la ses oficialaj lingvoj de UN, ĝis nun ne havas Esperantan vortaron.

Finfine la granda verko de Jorge Abraham, de longe eldonpreta, estas nun baldaŭ eldonota. Premio Degučī, financata de Oomoto, rekompencis la vivo-verkon de homo kiu sciis kree kombini du internaciajn lingvojn: Esperanton kaj muzikon. Dimitar Terziev gvidis la Internacian Ĥoron dum 16 Unversalaj Kongresoj kaj prezidis Muzikan E-Ligon ekde 1985, transdonante "la dirigentan bastonon" ĉi-jare al David Gaines.

"Longega listo de nomoj kiuj eble ŝajnas ekzotikaj" — tiel enkondukis Vlastimil Kočvara la nomaron laŭtlegotan por danki la tutan kohorton da homoj kiuj membris en la Loka Kongresa Komitato aŭ iel helpis en la organizado. Ilia marŝo al kaj foriro de la podio montriĝis en si mem plurminuta programero.

Christopher Fettes kondukis sur la scenejon armeeton da infanoj, partoprenintoj de la Infana Kongreseto kiun li kunorganizis. Parolante pri la


neceso igi Esperanton alloga por infanoj, li parafrasis la faman diraĵon de Martin Luther King, "Mi havas revon", al "Mi havas nevon". Lia nevo nomigas Mark Fettes, kaj sen la onkla influo li eble ne estus hodiaŭ estrarano de UEA.

Transdonante la kongresan flagon al Kep Enderby, LKK-estro de la Adelajda UK, Vlastimil Kočvara mildigis la emocijon de la momento per la rimarkigo ke li "transdonas ĉefe la taskojn" kaj, tre prak-

tike, li enmanigis al Enderby apartan flageton por efektiva kunporto en ties valizo.

En sia kongresferma parolado LEE Chong-Yeong menciis la mortigan bombon kiu eksplodis antaŭ kelkaj horoj en la usona Atlanta, dum la Olimpiaj Ludoj. Tiaj manifestiĝoj de malspaco povas nur plifirmigi nian volon al la antaŭenigo de paco kaj kompreno per nia propra rimedo, la internacia lingvo Esperanto — li konkludis, akorde al la tuj sonantaj harmonioj de la himno "La espero". ★

Laste aperis



Amuza matematiko por gelernantoj. Dua kompletigita eldono. Petko Arnaudov (1931), Ljudmila Arnaudova (1938). El la bulgara trad. la aŭtoroj. Sofio: Pres-Esperanto, 1992 (2-a, kompletigita eldono). 108p. 20cm. Ilus. Diversaj problemoj kaj tekstoj je pluraj niveloj; abunde ilustrita per desegnaĵoj kaj figuroj. 15,00 gld.

Ardes. B. Tornado [Boris Tokarev, 1927-1994]. Moskvo: Impeto, 1996. 180p. ISBN 5-7161-0026-0. 20cm. Sciencfikcia, soci-kritika romano pri vojaĝo al la lando de la Flamoj. 19,80 gld.

Armeoj de Paluzie, La. Manuel de Seabra (1932). Viena: IEM, 1996. 198p. ISBN 3-901752-01-3. 23cm. Aŭtobiografie inspirita romano pri Barcelona familio en la unua duono de la jarcento. 27,00 gld.

Astrid Lindgren kaj ŝiaj verkoj. Kerstin Rohdin (1937). Skövde: Al-fab-et-o, 1994. 33p. 21cm. Prelego pri la sveda aŭtorino de *Pippi ŝtrumpolonga* kaj de aliaj infanlibroj. 10,80 gld.

Bapto de caro Vladimir, La. Křest svatého Vladimíra. Karel Havlíček Borovský (1821-56). El la ĉeĥa trad. Tomáš Pumpr. Chapeco: Fonto, 1996 (3-a eld.). 127p. 21cm. Ilustraĵoj de Josef Lada. Sprit-versa satiro pri despotismo, korupto kaj aliaj malvirtoj, en klasika traduko. 24,00 gld.

Baza ĉeĥa konversacio. Stanislava Chrdlová, Miroslav Malovec. Dobřichovice: Kava-Pech, 1996. 30p. ISBN 80-85853-22-1. 17cm. 3,00 gld.

Cent ans d'Esperanto en Saône et Loire et dans la région Rhône-Alpes, 1895-1995. Dr. André Vadrine (1914), en kunlaboro kun Ida Vadrine. Francŝtato. Lyon: la aŭtoro, 1996. 10+303p. 21cm. Mimeo. Historio de cent jaroj da Esperanta movado en la regiono ĉirkaŭ Liono. 30,00 gld.

Diaj vojsignoj. DEGUČI Onisaburo (1871-1948). El la japana trad. MAEDA Ŝigeki. Kameoka: Oomoto, 1996. 91p. 26cm. Unu el la sanktaj libroj de la religio Oomoto, verkita de ĝia kunfondinto. 15,60 gld.

Du turegoj, La. John R.R. Tolkien (1892-1973). El la angla trad. William Auld. Jeka-

terinburg: Sezonoj, 1996. 429p. 21cm. Bind. Kromkovrilo. Dua parto de la epopeca rakontego "La Mastro de l'Ringo". 45,00 gld.

El miaj sonoraj soloj. Poemoj 1992-1995. Miguel Fernández (1950). Viena: IEM, 1996. 100p. ISBN 3-85182-039-8. 23cm. La unua memstara volumo de unu el la plej grandaj poetoj Esperantaj. 22,50 gld.

Espéranto au service de l'enseignement du français, L'. Quelques possibilités. Jean-Pierre Ferrari. Bellinzona: "Hans Dubois", 1996 (2-a eld.). 45p. 21cm. Utiligo de Esperanto por pli efike instrui la francan konjugadon. 21,00 gld.

Esperanto, eine neue Brücke zur Welt. Für den Kurs- und Selbstunterricht. Till Dahlenburg (1934). Torino: Heroldo de Esperanto, 1996. 254p. ISBN 83-905817-0-1.

Inter vivo kaj morto. Poemoj. Julius Balbin (1917). Pisa: Edistudio, 1996. 155p. ISBN 88-7036-068-7. 22cm. Bind. Poemaro dediĉita "al la memoro de ĉiuj viktimoj de la nazia murdfurio". 27,00 gld.

Internacia familio — utopio aŭ realaĵo? Internacia Jaro de Familio — Simpozio. Red. Zlatko Tišljár. Maribor: Inter-Kulturo, 1995. 107p. ISBN 961-6075-06-3. 21cm. Prelegoj de simpozio en 1994, pri familioj de diplomatoj, minoritatanoj, gastlaboristoj, esperantistoj aŭ alie internaciaj. 15,00 gld.

Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI. Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj kun celaro, postularo, regularo kaj specialaj testoj. Roterdamo/Antverpeno: UEA/ILEI, 1996 (repr. de la 1-a eld.). 36p. 21cm. 4,80 gld.


Knaboj de kastora rivero, La. Jaroslav Foglar (1907). El la ĉeĥa trad. Dieter Berndt. Třebíč: Skolta E-Ligo kaj E-Klubo de Theodor Kilian, 1996. 175p. ISBN 80-900189-8-X. 20cm. Romano pri aventuroj de urbaj knaboj en skolta tendaro. 9,90 gld.

Kubaj popolaj fabeloj. Antologio. El la hispana elektis, adaptis kaj trad. Marin Bacev. Varsovio-Sofio: Interlibro, 1996. 72p. ISBN 83-85161-68-6. 21cm. Laŭ magnetofonaj surbendigoj kolektitaj antaŭ 1960 en la provinco Las Villas. 4,50 gld.

Language Status in the Post-Cold-War Era. Papers of the Center for Research and Documentation on World Language Problems 4. Red. Kurt E. Müller. Lanham/New York/London-Rotterdam/Hartford: University Press of America/CED, 1996. 152p. ISBN 0-7618-0299-1. 24cm. Bind. Konferencaj referaĵoj de F. Cestac, J.A. Fishman, T. Reagan, H. Tonkin k.a. pri "lingvoj kaj internacia edukado" kaj pri "lingvoj kaj internacia komunikado post la malvarma milito". 78,00 gld.

Lexicon silvestre. Vortaro de forsta fako (kun difinoj). Eberswalde: Förderverein "Lexicon silvestre" e.V., 1995. 84p.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insigno k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!



La kongresa libro-oferto montris la jaron 1996 riĉa je originala beletrio.

21cm. Lernolibro por germanlingvaj kursanoj kaj memlernantoj. Kun multaj esprimoj el la ĉiutaga vivo, kaj informoj pri Esperantio. 30,00 gld.

Fabeloj/Fabula. Bahri Peraj (1952). Nagyzkanizsa: Tibor Szabadi, 1996. 23p. 15cm. Dulingva: albana-Esperanta. Dek kvar fabeloj kaj prozpoemoj, en dubinda lingvaĵo. 5,40 gld.

Guto da roso la dua. El la japana trad. Okumura-Rinzo. Osaka: la tradukinto, 1996. 61p. 19cm. 517 haĵoj. 16,50 gld.

Inoj. Elektitaj poemoj. František Halas (1901-49). El la ĉeĥa trad. kaj postparolis Josef Rumler. Chapeco: Fonto, 1996. 64p. 21cm. Riĉe ilustrita. Fonto-Kajeroj 18. Mildaj kaj erotikaj poemoj de vortomajstro. 15,00 gld.

ISBN 3-931 262-08-1. 30cm. Bind. Milo da pri-arbaraj nocioj sistemigitaj, kun alfabeto indekso. Kun proponaro por forstfakaj kolektoj de PIV. 57,00 gld.

Ludovikologia dokumentaro XIII. Lingvo internacia III. Kioto: ludovikito, 1996. 361p. 22cm. *Lingvo internacia*, monata gazeto por la lingvo Esperanto; jarkolektoj 1901-1902. 57,00 gld.

Metamorfozo, La. Franz Kafka (1883-1924). El la germana trad. Mauro Nervi. Pisa: Edistudio, 1996. 75p. ISBN 88-7036-069-5. 22cm. Bind. Serio Oriento-Okcidento n-ro 31. Kun antaŭparolo de la tradukinto. "La plej perfekta novelo de la germana literaturo" kaj "la plej grava voĵurno de la eŭropa kulturo en ĉi tiu jarcento" (Nervi). 24,00 gld.

Mia eno. Lidia Ligeza (1942). Kraków: Behemot, 1996. 45p. ISBN 83-904734-3-7. 17cm. 25 poemoj originalaj kaj tradukaj el la pola, en kiuj la aŭtorino malfermas la komodo-tirkeŝtojn de sia eno. 9,00 gld.

Naskiĝo de la rustimuna ŝtalaro (1985). Harry Harrison (1925). El la angla trad. internacia grupo per komputila reto. Jekaterinburg: Sezonoj, 1996. 222p. 21cm. Bind. Kromkovrilo. Kiel Jim diGriz, posta heroo de fascinaj sciencfikciaj aventuroj, komencis sian krim-karieron per bank-rabo sur la planedo Paradizeto. 24,00 gld.

Ombro sur interna pejzaĝo (1984). Spomenka Ŝtimec (1949). Pisa: Edistudio, 1996 (2-a eld.). 142p. ISBN 88-7036-019-9. 22cm. Bind. Intima aŭtobiografia romano. 27,00 gld.

Peto persisti, La / Prośba o wytrwanie. Antologio de infana poezio kaj prozo. Elektis kaj prilaboris Inka Weksler. El la pola trad. Tyburcysz Tyblewski. Kamienna Góra-Przedwojów, 1996. 133p. ISBN 86324-15-5. 21cm. Verkaj ekestintaj dum lecionoj de Freinet-metode inspirita instruistino. 7,50 gld.

Peza vino / Těžké víno. Eli Urbanová (1922). Aranĝis kaj el la ĉeĥa trad. Josef Rumler. Dobřichovice: Kava-Pech, 1996. 37p. ISBN 80-85853-21-3. 20cm. 12 elektitaj poemoj en spegula eldono Esperanta-ĉeĥa. 4,50 gld.

Pli ol homo, esperantisto! La D-ro Senesperanto kaj la alternativa lingvo. Arnau Torras Tutusaus (1966). Zagreb: Studenta E-Klubo, 1996. 48p. ISBN 953-96912-0-6. 30cm. Subgrundaj bildstrioj originale Esperantaj, kiujn oni uzu, laŭ la aŭtoro, por purigi pug-truon. 12,00 gld.

Sonĝo kaj aliaj rakontoj. Franz Kafka (1883-1924). Elektis kaj el la germana trad. Wilhelm Luttermann. Dobřichovice: Kava-Pech, 1996. 102p. ISBN 80-85853-25-6. 20cm. La fama *La transformiĝo* kaj 16 aliaj rakontoj, en traduko fidele sekanta la stiltraĵojn de la originalo. 15,00 gld.

Svedaj arboj kaj arbedoj. Proponoj al Esperantaj sciencaj kaj komunlingvaj nomoj laŭ Zoologia kaj botanika nomenklaturaj. Malte Markheden (1911). Sjö Haga: la aŭtoro, 1988 (aldono 1996). 26+7p. 21cm. 7,50 gld.

Vipo kaj la turbo, La. Mallonga romano (1975). Andrej Capuder (1942). El la slovena trad. Vinko Ošlak. Maribor: Inter-Kulturo, 1995. 118p. ISBN 961-6075-09-8. 21cm. La unua

disidenta romano en la slovena literaturo kiu aperis en Slovenio mem. 15,00 gld.

Wurden = Vortoj. Albert Hoekstra (1934). De Jouwer: E-Studgrupo, 1996 (2-a, plibonigita eld.). 114p. 21cm. La unua E-vortaro por frisoj. Kun ĉ. 8000 vortoj en la frisa-E parto kaj ĉ. 2000 en la E-frisa. 18,90 gld.

Zur Geschichte des Deutschen Arbeiter-Esperanto-Bundes in Leipzig (Weestsachsen). Teil I und II. Von den Anfängen bis zum Verbot (1933). Ino Kolbe (1914). Komentoj kaj prilaboro de Detlev Blanke. Leipzig: Landesverband Sachsen des DEB, 1996. 236p. ISBN 3-00-000530-7. 21cm. Germanlingva. Komentitaj dokumentoj pri la historio de Germana Laborista Esperanto-Asocio en Lepsiko kaj Okcidenta Saksio, de la komenco ĝis la malpermeso en 1933. 18,90 gld.

DIVERSAĴOJ

Kasedoj:

De tempo al tempo. Kantoj de Mikaelo Bronŝtejn (1949). Stockholm: Pigo-Studio, 1993. 57 min. Kanzona kaj poezia recitalo de la rusa bardo. 15,00 gld.

Fantoma fenomeno. Rokmuziko. Rolf Fantom (1980). Newbury: la aŭtoro, 1996. 40 min. 11 kantoj de juna aŭtoro-kantisto-komponisto. 21,90 gld.

Internacia elparolo. V. Sadler, M. Sudec, M. Vermaas, G. Pompilio, W. Schmid. Rejkjaviko: Islanda E-Asocio, 1996. 13 min. Kvin mallongaj tekstoj laŭtlegitaj de iamaj UEA-oficistoj diversnaciaj. 12,00 gld.

Mi rompas mian rutinon. Georgina Almanza. Havano, 1996. 58 min. Verspero kun la konata kuba aktorino. 19,80 gld.

Najado. Opero je tri aktoj. Antonín Dvořák (1841-1904). Teksto de Jaroslav Kvapil. El la ĉeĥa trad. Tomáš Pumpr. Praha: Český rozhlas, 1996. Du kasedoj, 120 min. Ĉeĥe *Rusalka*, la plej fama el la tri operoj de la aŭtoro. Monofonia registraĵo de E-lingva elsendo de la Praga radio el 1950, kun elstaraj kantistoj de la epoko. 28,50 gld.

Poemoj, kanzonoj, monologoj. Georgina Almanza. Havano: Heliko, 1996. 55 min. Pecoj malnovaj kaj novaj. 18,00 gld.

Vinilkosmo-kompil'. Volumo 2. Donnevill: Esperanto-Rok-Asocio, 1996. 64 min. 19 grupoj kaj kantistoj prezentas sin en Esperanto, en diversaj stiloj, de punko kaj hard-roko ĝis popo kaj opereto: Massimo Manca, Akordo, Fabulous Trobadores, Piĉismo k.a. 23,10 gld.

Kompaktaj diskoj:

Muzik-pluvo. Akordo. Waalwijk: Akordo, 1996. 46 min. 25 mezepokaj kaj folkloraj kantoj, prezentataj de sep-persona kantensemblo nederlanda. 30,00 gld.

Vinilkosmo-kompil'. Volumo 2. Donnevill: Eurokka, 1996. Vd. ĉe kasedoj. 39,00 gld.

Vidbendo:

Verda-stelulo, La. Sciencfikcia filmo. Reĝisoris Francisko Randin. Scenaro de Dan Nir. Dialogoj de Johán Valano. Kun Rolfo, G. Lagrange, L. Dovat. Lausanne: Filmoj Nandir, 1996. 30 min. VHS(PAL/SECAM), NTSC. Eksterteranoj lernas Esperanton por komuniki kun homoj. 66,00 gld.

Afriko: Atenton al leg-bezono

Dank' al la klopodoj de Hans Bakker kaj malavaraj donacoj, pluraj afrikanoj alvenis Pragon. En la kunveno pri afrika agado ili mem prezentis sian movadon: en Ganao, kie troviĝas 80 e-istoj, Esperanto evitas tribismon; Madagaskaro spertas novan ondon de entuziasmoj; Tanzanio akceptis la Kvaran Afrikan Kongreson. Pri Alĝerio unu ĉeestanto asertis ke li povas elmontri tie sian esperantistecon senprobleme, dum la alia havas timojn pro sia malfermiteco al la mondo. Raporto de Miguel Faria de Bastos (Portugalia) pri Angolo fokusigis la atenton al la bezono je lego- kaj lernomaterialo. Kial ne sendi legitajn E-gazetojn al afrika klubo, aŭ pagi abonon por ili? Ĝojigas la informo ke Unesko pretas inviti afrikan e-iston franclingvan por prelegi pri "Esperanto kaj la afrikaj lingvoj" en venontprintempa kolokvo en Ouagadougou. (R. Triolle)

Rond-okule kaj radar-orele

Sylvain Lelarge iris al sia unua UK kiel oni plonĝas en nekonatan akvon: fermante la okulojn, sen iel scii kiom ĝi profundas, kiuj amikaj aŭ strangaj, eĉ danĝeraj kreitaĵoj loĝas en ĝi... kaj kia estas ĝia temperaturo.

Mia nura preparo: la aliĝo kvin monatojn antaŭe. Aldone, multaj semajnoj da alikampa laboro sentigis min ne plu kapabla elbuŝigi ion pli longan ol "Saluton!"

Sep tagojn poste, rerigardante, mi miras kiom mi riĉiĝis. Larĝa estas la fendo inter la intelekta Esperanto-kono de (eĉ fervora) memlerninto kaj inter la multisensa travivo de amasrenkontiĝo tia kian mi spertis en Prago. Tiun fendon mi transpasis rond-okule kaj radar-orele, kvazaŭ sur iu Karola ponto: jen dekstre kantisto varmvoĉa, jen maldekstre dancistino papilia, en ĉiu angulo alia artisto... Kaj la publiko! Ankaŭ ĝi, precipe ĝi min fascinis: centoj da grupetoj jen plej serioze diskutantaj, jen moketantaj unu la alian per sprita aŭ absurda vortludo, tie parolrivero,

Kongresa kroniko

Ameriko: Interlanda agado

La movada situacio malsamas de lando al lando, sed jam ekzistas interlanda agado — konfirmis reprezentantoj de landaj asocioj el Brazilo, Kanado, Kostariko, Kubo, Meksiko, Usono kaj Venezuelo. Okazas korespondado, sendo de lernomaterialo, interŝanĝo de bultenoj, aranĝo de prelegvojaĝoj. Oni prezentis kelkajn venontajn aranĝojn: “Apliko de Esperanto en scienco” (Havano, majo 1997), ĉeĥa ekspedicio tra suda kaj norda Ameriko (mart.-sept. 1997), Amerika Kongreso (Bogoto, 1999). (R. Triolle)

Aŭkcio: El ĉiaj fontoj

Aŭkcianto Peter Weide vendis valorajn kaj kuriozaĵojn por sumo egala al pli ol 3000 guldenoj, enkasigotaj ĉifoje al la Volontula Fondaĵo. Dum poemaro *El subaj fontoj* de Eli Urbanová kun ŝia subskribo ne atingis pli ol 150 ĉeĥajn kronojn (1 gld. = ĉ. 16 ĉk.), aŭtografoj de la kompleta LKK-anaro sur kongresa afiŝo valoris eĉ 700 ĉk. Kiel dediĉanto Auld havis plej altan kurzon: du subskribitaj volumoj de lia traduko *La Mastro de l' Ringoj* taksigis je 2600 resp. 1500 ĉk. Kiel kiso, li verŝajne ne atingus la prezon aljuĝitan al kiso de Michela

Lipari (600 ĉk.). Kongresa numero 1 por la Adelajda UK estis rezervita por 1500 ĉk., sed T-ĉemizo kun aŭstralia motivo vendiĝis je duoble tiom. Ne mankis alkoholaĵoj: Esperanto-vino el 1993 (du boteloj po 850 ĉk.), kaj botelo de la ĉeĥa likvoro beĥerovko kun la subskribo de UEA-prezidintoj/anto Tonkin, Maertens, Wells kaj Lee (1500 ĉk.). Kelkaj libroj ŝajnis eĉ malpli koste aĉeteblaj ol en la Libro-servo, ekz. *Plena Vortaro* el 1935 (150 ĉk.) kaj *Vortoj de Profesoro Th. Cart* (200 ĉk.). Tamen, la rekord-preza aŭkcio ja estis libro, la porinfana *La Struvelpetro* (1921, tr. Applebaum, konata en la nova traduko de R. Fischer, 1988, kiel *Hirthara Petro*), je 7000 kronoj. (M. Rados)

Interreto: Lasta UK sen ret-ligo?

Superplena salono pravigis la unufojan okazigon en UK de ĉi-tema kunveno. Viglis la tre konata debato pri la optimuma anstataŭigo de

tie ĉi stumblanta lango, ĉie interrassa renkonto, ĉiam interesa rakonto! Jes ja, mense sed precipe emocie mi pliriĉiĝis, kaj mi tre dankemas pro tio.

samideano sur kiu li/ŝi povus apogi sin dum siaj unuaj paŝoj? Kvin minutoj da klarigo plurfoje tage povas estigi miraklojn... kaj evitigi bedaŭrindan malkuraĝigon! Kompreneble, la helpontaj volontuloj povus ricevi trejnadon duhoran — kaj iom da instrumaterialo — komence de la kongreso.

3. Krom la mesaĝtabuloj (plej bona sistemo!) indus starigi alian tabulon kun ŝlosilvortaj priskriboj de interesoj, demandoj, proponoj. Oni povus tiel ekzemple iniciati novan (fak)reton, interŝanĝi informojn pri ŝatokupoj... aŭ nur legi la tabulon kun miro kaj amuziĝo pri la homa diverseco.



“... grupetoj jen serioze diskutantaj, jen mokantaj unu la alian...”

Ĉar mi scias kiom da organizo, da laboro, da pacienco postulas tiel giganta evento: antaŭe, dume, poste. Unuflanke ebligi la estiĝon de spontana festo kaj de malstreĉa etoso, kaj aliflanke krei plenan klarecon pri kie kiam kio okazos, tio vere estas majstrofarado. Al ĉiuj kiuj kunorganizis la UK-on 1996 iras miaj koraj dankoj!

Finfine, tri ideoj:

1. Kial ne organizi sistemon por “parigi” ĉiun komencanton kun sperta

2. Mi spertis dum tiuj tornadaj tagoj momentojn intensegajn, sed ankaŭ horojn malplenajn, dum kiuj mi sencele rondmarŝadis. Kion mi bezonus tiam estas loko kie troveblas tiumomentaj renkontiĝemuloj. Tia konstanta loko malaperigus reciprokan ĝenon.

Nun mi sidas en mia domo kaj ege sentas la emon — ne: la bezonon — aŭdi Esperanton. Mi tuj telefonos karan samideanon kaj morgaŭ turmentos mian radio-aparaton por ke ĝi ekparolu Esperante!

Sylvain Lelarge (Nederlando)

Ĉapelitaj literoj en Interreto — sed oni konsentis nur pri la bezono de konsento. Franko Luin (franko@omnibus.se) prezentis paĝaron de Sveda E-Federacio (espero@esperanto.se), kiun konsultas po cent interesatoj tage. Li ankaŭ alvokis ke esperantistaj organizoj rapide registrigu regnomojn enhavantajn “esperanto” antaŭ ol ekstermovadanoj rezervus ilin. (“esperanto.com” estas jam uzata de privata firmao!) Laŭ Konrad Hinsen (hinsenk@ere.umontreal.ca) ankaŭ unuopuloj klopodu inkludigi “esperanto” en sia retadreso. Jan Pospíšil (comfin@mail.inec.cz) lanĉis “Virtualan Terminologian Centron”. Venis fortaj instigoj por ke UEA liveru pli da sur-retaj servoj. Fine la gvidinto Mark Fettes (mfettes@magi.com) trafe deziris al ĉiuj ke la Praga estu la lasta UK sen propra ret-ligo. (KAI Koichi, kkai@a2.mbn.or.jp)

Ĵurnalistoj: Financo bremsas

Ĉu troa sukceso povas ruinigi fakan asocion? Ŝajnas ke — preskaŭ. La 80-membra Tutmonda E-ista Ĵurnalista Asocio (TEĴA) kvarfoje jare eldonas brilan fakan periodaĵon, *Internacia Ĵurnalisto* (IĴ). Ne malpli ol 62 personoj sekvas popularan korespondan kurson pri ĵurnalistiko sub gvido de kvin TEĴA-docentoj. En la UK mem premieris sukcesa trejnkurso. Post la landaj sekcioj en Bulgario, Pollando kaj Rusio, ĵus fondiĝis sekcio japana.

Sed la kostoj de la altnivela agado tiom ekpezis sur la financo de TEĴA ke eĉ ĝia malfondo ŝajnis ebla. Feliĉe, en la jarkunveno 23 membroj decidis konservi la asocion, eldononte anstataŭ IĴ nur modestan cirkuleron plus jaran almanakon, kaj kompanse malaltigi la membrotizon de 30 al 15 germanaj markoj. La lasta ĉi-jara numero de IĴ tamen ankoraŭ aperos, dank’ al privataj donacoj.

Stariĝis laborgrupo, estrata de Bruno Masala, por studi la eblon krei — sub la aŭspicioj de TEĴA — sendependan inform-agentejon movadan, kiu estus konsultebla por kotizpagantoj.

Ĉiuj veraj esperantistoj
abonas al la plej ofta E-gazeto

EVENTOJ

Ĉu ankaŭ vi?

pk 87, HU-1675 Budapest, Hungario

Kongresa Libro: Via adreso, mi petas?

En pluraj forumoj kongresanoj plendis ke ĉi-jare la kongreslibro ne helpas la konatiĝon kun samfakuloj, samhobianoj kaj novaj amikoj, ĉar ĝi enhavas nur lando- kaj urbo-nomojn anstataŭ kompletaj adresoj. Fakte, la neaperigon de ĉi lastaj la Estraro estis decidinta pro alispecaj plendoj: multaj ne aprezis ricevi post la kongreso komercajn proponojn, informilojn ks., de firmaoj esperantistaj kaj aliaj, kiuj (mis)uzis la adresaron por siaj celoj. Kompromisa solvo por venontaj UK-oj: sur la aliĝiloj oni povos indiki ĉu oni konsentas publikigi sian adreson.



Esperantistaj artistoj
ekspoziciis je kelkaj
paŝoj de la bufeto.

Kongresejo: Akurate kaj kaprice

La panoramo de Prago, kiun oni povis ĝui el la haloj de ĉiu etaĝo, estas malfacile superebla defio por kiu ajn kongresejo. Imponis ankaŭ la akuratega komencado de ĉiuj programeroj, foje embarasa por kongresanoj kutimiĝintaj al malpli da horara disciplino. Ne tiom plaĉis la ŝajna kaprico kiu regis la fermadon de diversaj koridordoj kaj necesejoj, la funkciigadon de rulŝtuparoj... Tio des pli malfaciligis la orientiĝon en la iom labirinta kongresejo, konstruita cetere sen aparta atento al handikapuloj, beboĉaroj kaj personoj malfacile moviĝantaj.

Kuriero: Du sonoradoj tage

Plenumi la ambicion de ĉiu kongresano, ekhavi plenan kolekton de la kongresa kuriero, postulis pli da atento ol kutime. Nome, *Pragaj Sonoriloj* aperis, de dimanĉo ĝis vendredo, dufoje tage (krom en merkredo): la historie verŝajne rekorda rezulto estas 11 numeroj sur 56 paĝoj. Redaktoro Miroslav Malovec kaj lia skipo liveris fidindan kaj utilan informaron, eĉ kun relative malmultaj preseraroj: “vicĉefurbesto” en n-ro 10 estis escepto kon-

firma la regulon. Dankon al *Sonoriloj* por la informoj kiujn nia revuo ĉerpis el ĝi.

Landa agado: Por kunlaboro horizontala

En ĉeesto de la respondecaj estraranoj, Povilas Jegorovas kaj Renée Triolle, ekestis vigla diskuto en la ĉi-tema kunveno. Kion atendas UEA de la landaj asocioj (LA-j)? Ke ili plenumu la komitatajn decidojn, respondu ĝustatempe, estu la lokaj reprezentantoj de UEA, peru viglan dudirektan komunikadon. Kion la LA-j atendas de UEA? Respondojn al siaj ideoj, ĝeneralajn kondiĉojn por sia laboro (materialojn,

instrukciojn, konsilojn). Kunlaboro okazu ankaŭ horizontale, inter la LA-j. Ĉi tiu revuo dediĉu pli da spaco al la agado de LA-j. (R. Triolle)

Radio: El la unuaj eĥoj

La japana programo de la internacia germana elsendo Deutsche Welle raportis pri la UK la 5-an de aŭgusto, rimarkigante ke “lastatempe ĝi fariĝis aparte populara ĉe la juna generacio”. (Rokuro Makabe)

Ŝteloj: Vicis priŝtelitoj

Kiom kreskis en la lastaj jaroj turismo en Prago, tiom kreskis neeviteble ankaŭ ŝtelado, eĉ rabado, sur ĝiaj stratoj. E-istoj, ofte kun siaj kongresaj sakoj kaj ŝildoj, estis certe okulfrapaj al ŝtelistoj. Jen unu kazo raportita en la belga E-revuo *Inter ni*: “En la metroo, praktike antaŭ niaj okuloj, oni ŝtelis de [Maria] ŝian monujon, kvankam ĝi estis taŭge lokita en saketo fiksita sur la antaŭo de ŝia zono. [...] En la policejo, kien ni poste trafis, amaso da esperantistaj kongresanoj kaj eŭropaj turistoj staris en vico, ĉiuj viktimoj de la sama fiokazaĵo.” ★

Sub la signo de Mazi kaj memlernado

Ĉirkaŭ la temo "Rimedo por bona lernado kaj memlernado de Esperanto" kristaliĝis la popularaj "Tago de Lernejo" kaj la postkongresa ILEI-konferenco.

Trihora senpaŭza aranĝo, la Tago de Lernejo, montriĝis unu el la plej vizitataj programeroj de la UK. Unue, laŭ tradicio, la ILEI-sekciestro en Ĉeĥio, Miroslav Malovec, prezentis la edukistemon de la gastiga lando. Sekvis informoj de Lusi Harmon pri nova vidbenda kurso preparata en Usono. Andrzej Pettyn donis utilajn konsilojn pri la rolo de radio-elsendoj en la memlernado de Esperanto. Plej spektakla estis la lasta ero: post prezento de nova didaktika libro por la Mazi-kurso kaj de ĝia televida adapto, la speciala gasto f-ino Emily Barlaston provokis ridegojn per sia parodio pri "la reĝa palaco kaj ĝia ĉirkaŭaĵo".

En pli frua kunsido de ILEI, la estraro koncize raportis pri la atingoj de post la lasta UK, kaj estis prezentataj, dum pli ol unu horo, instruotaj novaĵoj (projektoj, lerniloj, helpiloj) de ĉie en la mondo. Dum la tuta semajno ILEI-budo informadis interesatojn pri E-instruado, la Mazi-projekto, aŭ "intelektala loterio" zorge de Géza Kurucz.

Ĉeĥio gastigis tri somerajn sesiojn de la UEA/ILEI-ekzamenoj. Ilia bilanco similis al la pasintjara: sukcesis 25 kandidatoj (1995: 24), 15 elemente (9) kaj 10 meze (15). Post pasintjara provsesio ĉe la Internacia Kongreso de Blindaj E-istoj, ges-roj Moerbeek denove prizorgis la brajligon de la testoj kaj donis utilajn informojn al la kandidatoj: sukcesis 7 el 5 landoj (2 je elementa, 5 je meza nivelo). Plej populara, kiel kutime, estis la sesio dum la UK: el 16 kandidatoj 9 sukcese trapasis elementan, 4 mezan nivelon (do, 13 el 10 landoj). Fine, al la sesio dum la ILEI-konferenco aliĝis 7 provontoj el 5 landoj, el kio fruktis 4 elementaj kaj 1 meza sukcesoj.

La 30-a ILEI-konferenco

74 instruistoj kaj instruistoj el 31 landoj konferencis tutan postkongresan semajnon (27 jul. – 2 aŭg.) en Tábor pri la temo ekstraktita en la Tago de Lernejo. Post longa tempo



Pedagogio en praktiko: konversacia rondo en silenta momento.

denove, la inaŭguron ĉeestis reprezentanto de UEA, vicprezidanto Renée Triolle, kaj la unuan fojon reprezentis la Akademio, per sia prezidanto d-ro Werner Bormann.

Prelegis Yaw Frempong pri instruado en Ganao, Till Dahlenburg pri proverboj, Ronald J. Glossop pri lerniloj verkitaj por infanoj en Usono, Marija Belošević pri E-instruado en Alp-Adrio, kaj Pavla Dvořáková pri "Lingvolernado kiel rimedo de personeca disvolviĝo". Dum la konferenco funkciis du Mazi-studgrupoj kaj C-seminario pri la Cseh-metodo. Deko da gejunuloj ferie studis en la 4-a ILEI-gimnazio.

Laŭ unuanima decido, honora membro de la Ligo iĝis Mila van der Horst-Kolińska, la motoro de la Mazi-projekto. Elektiĝis nova estraro, Raymond Wylleman (Belgio), kaj reelektiĝis kasisto Bertil Andréasson (Svedio). La Komitato de ILEI krome pridiskutis ekkunlaboron kun la Akademio, daŭrigon de la kun-

agado kun Ligo Internacia de Blindaj E-istoj, kaj la neceson atente sekvi la evoluon de la rilatoj kun Unesko. Rezolucio — tuj tradukita al deko da lingvoj — petis Uneskon "atenti la klerigan rolon de Esperanto [...] por internacia kunlaboro kaj reciproka aprezo kaj protekto de ĉies kulturoj" kaj helpi en la disponigo de E-lerniloj al homoj malavantaĝataj. Aparta temo estis informado: ILEI planas baldaŭ lanĉi sian TTT-paĝon kaj informilojn en pluraj lingvoj.

Estis difinitaj la venontjaraj temoj kaj dato de la ILEI-konferenco: "Multkultureco kaj lingvolernado", 27 julio – 2 aŭgusto, proksime al Melburno. Gimnazio okazos kaze de sufiĉaj aliĝoj.

Laŭ raporto de Marija Belošević, sekretario de ILEI

ANONCETOJ

Vizitu Maastricht Esperanto-Domo: tranoktado 35 gld pp fakso/tel +31-43-213.247; retpoŝto Adriaanse@GVO.RuLimburg.nl.

Kiu juna paro interesiĝas transpreni Esperanto-Pres? Sendu detalojn pri vi kaj via ĝisnuna Esperanto-agado al R. Eichholz, Bailieboro, Ontario, Kanado, K0L 1B0. En septembro/oktobro mi probable estos en Eŭropo kaj povus viziti interesatojn.

8-paĝa bela lingvogvidilo, kiu helpas dum via vizito al Nepalo, kaj lerni la nepalan je baza nivelo, haveblas senpage. Sendu peton kun internacia respondkupono al Razen Manandhar, PO 3447, Kathmandu, Nepalo.

Impona infankongreseto

Aparte granda nombro da infanoj ĉeestis, samtempe kun la UK, la 30-an Internacian Infanan Kongreseton (IIK) en Nová Rabyně, 40 km-ojn sude de Prago — entute 59 infanoj el 21 landoj loĝis en feria hotelo kun multe da tereno kaj eĉ apudlaga strando.

La celo de infankongresetoj estas doni al Esperanto-parolantaj infanoj semajnon da aktivado pere de Esperanto, por ke ili ĝuu la sperton, kreu amikecojn kaj progresu en la lingvo. Por eviti krokodiladon, ili estis dividitaj en miksnaciajn grupojn, malsamajn por loĝado, manĝado kaj komunaj agadoj.

Ĉi lastaj konsistis el kroĉetado, pentrado, arto, logikoproblemoj kaj lernado bekfluti. La infanoj estis petitaj kunporti muzikilojn, kaj — kiel kutime — infanorkestreto estis formita. Bekflutistoj muzikis en aparta grupo. Dum liberaj momentoj speciale ŝatataj estis ĵonglado kaj farado de bidaj braceletoj.

Mardon ĉiuj infanoj vizitis unue fabrikon de pluŝaj bestoj, kaj poste la UK-kongresejon, kie ili kantis, kaj la

orkestro ludis la unuan movimenton de la Londona Simfonio de Haydn. Laŭ lastatempa tradicio, la infanoj “almozpetis” — uzante grandan violonĉelujon —, por remboata ekskurso.

Vendredon venis aŭtobuspleno da kongresanoj al la IIK-ejo por ĉeesti prezenton de la infanoj, kaj vidi iliajn manlaboraĵojn. Sabaton ĉiuj IIK-anoj iris al la UK, por kanti en la Solena Fermo. Kristoforo (Christopher Fettes, komisiito de UEA pri infankongresetoj) paroladis pri la bezono de bona kunlaboro inter UEA kaj la IIK, kaj program-organizanto Heleno Fantom petis la kongresanojn produkti pli da Esperanto-parolantaj infanoj. “Ne gravas kiel” — ŝi komentis.

Ian Fantom (Britio)

Fondaĵo Carson elĉerpota

La Eduka Fondaĵo Carson dum 12 jaroj plenumis la deziron de kanada farmisto Chuck Carson disdoni lian heredaĵon de sepdek mil dolaroj por helpi je iuspeca edukado per, pri aŭ por Esperanto.

Dum tiuj jaroj la Carson-Fondaĵo fakte disdonis pli ol 200 000 kanadajn dolarojn, sed nun la kuratoroj decidis elkasigi ĉion restantan en tiu ĉi jaro 1996. La sumoj disdonitaj en la pasinta jaro, kiel kutime, varias inter proksimume 100 kaj iom pli ol 3 000 kanadaj dolaroj.

De post nia lasta raporto (jul.-aŭg. '95, p. 134), la kuratoroj elektis subteni jenajn projektojn:

- eldono de pola kaj uzbeklingva lernolibroj, Esperanto-angla vortaro en Hindio, islanda korespondado kurso, kaj son-magazino por akompani lernigan revuon en Madagaskaro;
- instruvojaĝoj al Brazilo, Ĉinio, kaj en kelkaj landoj de Afriko;
- sendado de perpoŝtaj kvizoj de Hungario al progresantoj tramondaj, subvencio de premio por lernintoj de korespondado kurso en Anglio, pretigo de studkurso perkomputila en Kubo, kaj Mazi-kompleto por Rumanio.

Se iu havas jam bone pripensitan kaj indan proponon kaj deziras ke la Fondaĵo ĝin pritraktu dum la lasta kunveno en oktobro, tiu bonvole *tuj* petu petformularon de la sekretario de la Fondaĵo ĉe 1339 Hamilton Street N.W., Calgary, Alberta, T2N 3W8, Kanado.

La kuratoroj planas solenan fermon de la Eduka Fondaĵo Carson en majo 1997, en Climax (Saskaĉevano), la iama loĝloko de nia malavara testamentinto. Intertempe, ni planas verki manlibron pri niaj spertoj en la kampo disdoni monon internacie, kun la celo helpi aliajn tiajn organizaĵojn kaj fondaĵojn en Esperantio.


Jean E. Smythe (Kanado)
Kuratorio de Fondaĵo Carson

STR-ANGULO

Alta akvo en la Centra Oficejo

Vera pluvo estas malofta fenomeno en Nederlando. Pluveto, ĉiutaga. Do, tiu torento kiu elĉieligis la 6-an de aŭgusto, vespere, restos longe en la meteorologiaj analoj. Via redaktoro trankvile sidis ĉe sia tablo kiam li spertis subitan duŝon... el la plafono. La tegmentaj defluiloj de la Centra Oficejo ne sufiĉis por forkonduki la akvegion, kiu trovis vojojn kaj formis rojojn tra ĉiu mur-fendo, ŝpruc-atigante eĉ la sekretariejon en malsupra etaĝo. Feliĉe, Biblioteko Hodler restis seka, kaj rapida dissterno de viŝtukoj savis la komputilojn de paneo pro malsekeco. Tamen, la plafonojn, plankojn kaj tapiŝojn trafis granda damaĝo, minacanta la firmecon mem de la konstruaĵo. La resekigo kaj reordigo, nur parte pagota de asekuro, daŭris kvar tagojn, kaj konsiderinde malhelpis ĉiujn oficejajn laborojn, inkluzive la redaktoraĵon.

ie



LA NOVA REALISMO

de Bruno Vogelmann

185 p. 19,80 gld. Pri Nova Pensado, Religieco Novstila, homaron unuiganta mondkoncepto. Premio Deguči, Premio FAME. Tradukita en 26 naciajn lingvojn. Havebla de ĉiuj libroservoj. El nepagipovaj landoj skribu al la aŭtoro, pk 1564, DE-74555 Crailsheim, Germanio.

Post *Mi vizitis grandan urbon*
la juna togolanda esperantisto
Gbeglo Koffi
denove ĝojigas
tiujn kiuj volas
scii pli pri la
vivo en afrika
lando.

De vilaĝo al ĉefurbo

Eldonis Fondaĵo Afriko de UEA. 32p.
Prezo: 8,10 gld. (triona rabato ekde 3 ekz.)
Mendu ĉe UEA.

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KŬAKTO estas gazeto
por ĉiu kiu serĉas interesan
legajon en Esperanto. Ĉiu
numero havas ankaŭ tekstojn
en tre facila lingvo, tiel
ke **KŬAKTO** estas aparte taŭga
por komencantoj kaj por
Esperanto-kursoj. Krome,
konkurso atendas vin en
ĉiu numero de la revuo!
En 1996 **KŬAKTO** aperos
6-foje. Abonu rekte de UEA
aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1996

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	125 frankoj	Nederlando	41 guldenoj
Aŭstrio	245 ŝilingoj	Germanio	37 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	765 frankoj	Hispanio	2300 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	32 guldenoj	Portugalia	2500 eskudoj
Britio	16 pundoj	Italio	34000 liroj	Svedio	185 kronoj
Danio	150 kronoj	Japanio	2880 enoj	Svislando	31 frankoj
Finnlando	115 markoj	Kanado	31 dolaroj	Usono	23 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**



Institucio Hodler '68 akceptas pruntojn sen
rento aŭ kun rento de 2% aŭ 5% por investi
profite al gravaj movadaj projektoj. Ankaŭ
donacoj estas bonvenaj.

Pasintjare la subvencioj sumiĝis je 7000 gld.
Informiĝu ĉe UEA!

La Esperanto-sekcio de la urba muzeo en Ĉeská
Třebova, kiu enhavas nun ankaŭ la Pragan Esperanto-
bibliotekon, serĉas ĉiajn publikigaĵojn Esperantajn el la
regionoj Moravio, Bohemio kaj Silezio ekde la komenco.
Bv. sendi informojn al: Městské Muzeum, Staré nám. 78,
CZ-56002 Ĉeská Třebova, Ĉeĥio, por s-ro Jiří Pištora.

Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and
Documentation of World Language Problems

**La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado
en la homa komunikado.
Kaj la kontribuo de Esperanto.**

Redaktas: Probal Daŝgupto,
Klaus Schubert, Humphrey Tonkin
Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519,
Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Aperas trifoje jare.
Individua abono: 77,00 gld.
Institucia abono: 167,00 gld.
Abonu pere de la Libroservo de UEA.

VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

MALFERMA TAGO

sabaton la 9-an de novembro 1996 (10h00 - 17h00)

- ★ Senhalta prezentado de Esperanto-filmoj
- ★ Aĉetante en la libroservo, vi ricevos rabaton de 10% (kaj ŝparos la sendokoston)
- ★ Senpaga loterio
- ★ Ankaŭ surprizaj ofertoj
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj

Speciala gasto:
HUMPHREY TONKIN



Modernaj ekipaĵoj pliefikigas la laboron de la Centra Oficejo.

FONDAĴO OFICEJA ILARO

bonvenigas ankaŭ vian donacon. Koran antaŭdankon!



La Jarlibro akompanos vin tra tuta jaro... donu taŭgan veston al ĝi!

UEA ofertas elegantan bonkvalitan platan kromkovrilon por via Jarlibro. Mendu ĝin kontraŭ 1,80 gld. (+ afranko kaj, ene de EU, imposto de 17,5%). Triona rabato ekde 3 ekz.



Tibor Sekelj

Kumeŭaŭa

Ree haveblas ĉi tiu populara romaneto tradukita en dudekon da aliaj lingvoj!

Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, de T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1994 (2-a eld.). 96p. 21cm. Riĉe ilustrita. 15,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.



Tendaraj tagoj

tri kajeroj

- specife por junuloj 10- ĝis 14-jaraj
- speciale emfazas parol-kapablon
- alloge ilustrita de Pavel Rak
- kun notoj por instruistoj



Verkis Stefan MacGill.
Eldonis ILEI/UEA/HJEA.



Prezo: 12,00 gld. por la unua, 15,00 gld. por la dua kaj 18,00 gld. por la tria kajero. Triona rabato ekde 3 ekz. ĉe UEA.

INDIVIDUAJ MEMBROJ HAVAS AVANTAĜOJN

OFERTO
Libroj kun rabato ĝis 60%!

Ekskluziva oferto de interesaj kaj valoraj libroj por ĉi-jaraj individuaj membroj de UEA: rabatoj kiuj repagas vian kotizon! Decidu mem ĉu vi deziras ricevi nur parton de via kotizo – aŭ eĉ jam tiun de 1997...

Esperanta Antologio. La plej impona kolekto de originalaj poemoj. 900p. Bindita. 60 gld. € 24 gld.

La granda Meaulnes. Romano de A. Fournier pri pura amo. 222p. 22,50 gld. € 15 gld.

Fundamenta Krestomatio. 18a eld. de la klasika legolibro de Zamenhof. 464p. Bindita. 48 gld. € 24 gld.

Winnie-la-Pu. Aventuroj de la fama urseto. Ilustrita. 173p. Bindita. 27 gld. € 18 gld.

Lingvo kaj vivo. Eseoj de Waringhien pri Esperanto. 452p. Bindita. 48 gld. € 27 gld.

Libro de amo. Erotika poemaro. 262p. 21 gld. € 12 gld.

Metodiko de la E-instruado. Baza gvidilo por instruantoj. 189p. 15 gld. € 10 gld.

Vetero kaj klimato de la mondo. Abunde ilustrita popularscienca verko. 132p. 27 gld. € 18 gld.

Jubileo. Ilustrita memorlibro pri la centjariĝo de Esperanto. 164p. 48 gld. € 18 gld.

Proverbaro Esperanta. 2630 zamenhofaj proverboj. 168p. 18 gld. € 9 gld.

Tiu ĉi oferto validas ĝis la **31a de dec. 1996**. Mendojn bv. adresi al la Libroservo de UEA, kun indiko de la kvantoj kaj titoloj dezirataj. Aldoniĝas sendokostoj je 10% (minimуме 5 gld.) kaj, por loĝantoj en EU, imposto je 6%.

KIU MURDIS LA BELAN DONELLA MANTOVANI?



LA ENKETO KONDUKAS JUĜISTON LAMBERTI EN RETON DE PASIOJ KAJ INTRIGOJ EN MALGRANDA ITALA URBO.

TIU TOSKANA SEPTEMBRO

CORRADO TAVANTI, ISTVÁN ERTL.
BUDAPEŝTO: HEA, 1990. 138P. 21CM.

12,00 GLD. TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ.